

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

1 · 1964





Foraj montoj en nebulo
(el la baldaŭ aperonta
albumo "El Ĉina Foto-
grafia Arto")

Foto de Cen Bo

Por Nova Venko en la Nova Jaro!

JAM venis la jaro 1964. Al niaj legantoj en ĉiuj partoj de la mondo ni sendas nian varman gratulon okaze de la komenciĝo de la nova jaro!

La pasinta jaro estis jaro, en kiu la socialisma konstruado de Ĉinio akiris grandan sukceson kaj ĝia nacia ekonomio komencis ĉiufланke prosperiĝi venkinte la influojn de la seriozaj naturaj katastrofoj en la tri sinsekvaj jaroj kaj diversajn malfacilojn kaj premojn. Tiujare, pliiĝis la produktokvanto de grenoj, grandskale kreskis ankaŭ la produktokvanto de la ĉefaj industriaj plantaĵoj. Rilate al la industria produkto, oni antaŭvidis superplenumon en kvanto kaj kvalito de la jaraj planoj. Rimarkinde pli vigliĝis la komerco, 40% de la funkciuloj kaj laboristoj ricevis salajr-altigon kaj ankaŭ la monsumo de premioj por ili pligrandiĝis. Disvolviĝon ricevis ankaŭ la aferoj de scienco, kulturo, edukado, higieno kaj korpokulturado.

Granda nombro da faktoj montras, ke rimarkinda sukceso jam estas atingita dank' al praktiko de la politiko konstrui socialismon en nia lando sin apogante sur siaj propraj fortoj tra la pena strebado dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962) kaj la jaro 1963 depost la antaŭensaltego en 1958. La nombro de tute aŭ parte konstruitaj grandaj kaj mezgrandaj industriaj entreprenoj projektitaj de Ĉinio kaj provizitaj per ĉinaj ekipaĵoj dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano estis 413, kaj tiu de la periodo de la Dua Kvinjara Plano estis 1013. La specoj de ŝtalo, ŝtala materialo, koloraj metaloj kaj ilmaŝinoj produktitaj de Ĉinio en 1962 pli ol duobliĝis kompare kun tiuj de la jaro 1957, kaj la specoj de ŝtonoleoj preskaŭ triobliĝis. Ĝis la fino de 1962, la nombro de sciencistoj kaj teknikistoj kreskis je 70% kompare al tiu de 1957. Nun nia lando jam povas mem projekti multajn grandtipajn kaj modernajn industriajn unuojn, inkluzive de ŝtala kombino, karbominejo kaj petrola rafinejo kun produktopovo de pli ol miliono da tunoj en ĉiu jaro, hidroelektrajo kun kapacito de pli ol 600,000 kilovatoj, fabriko de nitro-sterko kun produktopovo de 100,000 tunoj en ĉiu jaro ktp, kio estis nebla dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano. La bezonatan ŝtonoleon, kiun ni devis importadi el eksterlando, ni jam povas mem provizi fundamente. Kaj la popolaj komunumoj en la kamparo jam pli kaj pli bone montras siajn avantaĝojn. La agrikulturo prosperiĝas jaron post jaro kaj nova alta tajdo de agrikultura produkto estas formiĝanta.

En la dirita situacio, la tuta popolo de Ĉinio estas klopodanta por akiri pliapaŝan prosperiĝon en ĉiuj sferoj de la nacia ekonomio en la nova jaro.


En la pasinta jaro, ankaŭ la esperanta movado en Ĉinio vidis pli belan perspektivon de disvolviĝo. Krom la Fremdlingva Instituto kaj la Ĉina Popola Universitato en Pekino, kiuj jam endondukis Esperanton kiel lernobjekton, ankaŭ la Siĉuan-universitato, la Fremdlingva Instituto de Ŝanhajo, la Ĉengdua Universitato kaj aliaj altaj lernejoj fondis E-kursojn en 1963. Konforme al la novaj postuloj de enkonduko de Esperanto en lernejoj, speciala E-kurso por instruistoj malfermiĝis en Pekino en lasta decembro. Pasintjare en Pekino ankaŭ okazis renkontiĝo de esperantistoj el diversaj grandaj urboj por diskuti pri la esperanta laboro. Kaj esperantaj aktivadoj pli vigliĝis ankaŭ en aliaj urboj de nia lando.

Aparte menciinda evento estas, ke la ŝtata Fremdlingva Eldonejo en Pekino komencis eldonadon de esperantaĵoj. Tiu agado aldonas novan enhavon al la esperantaj eldonaĵoj kaj malfermas por la diverslandaj legantoj pli vastan terenon.

En la pasinta jaro, ankaŭ nia gazeto faris novan progreson. Kaj la enhavo kaj la formo de ĝi estis daŭre plibonigitaj, kaj nia legantaro notinde plimultiĝis. Ni bone scias, ke la progresoj atingitaj estus neblaj sen la subteno de niaj legantoj. Multaj legantoj nin favoris per siaj kontribuadoj, ĉiutage ni ricevadas leterojn el ĉiuj mondpartoj, kluj alportas al ni ne nur kuraĝigojn, sed ankaŭ valorajn proponojn kaj kritikojn; kaj multaj legantoj meminiciate propagandas kaj varbadas por *El Popola Ĉinio*, aŭ utiligas ĝian materialon por helpi aliajn koni la popolan Ĉinion. Al niaj fervoraj legantoj ni esprimas nian koran dankon. Ni esperas, ke ĉiam pli intensan, intiman kaj vastan kunlaboron ni havos kun nia legantaro. Ni scias ankaŭ, ke ankoraŭ multaj mankoj ekzistas en nia gazeto kaj ĝi ankoraŭ ne povas plene kontentigi la multflankajn postulojn de la legantoj. Por plenumi iliajn postulojn ni devos klopodi ankoraŭ pli multe. En 1964, ni intencas fari pli bone organizitan raportadon pri certaj ĉefaj temoj por havigi al la legantaro ĉiufланkan konon pri la koncerna temo. En la sekvonta numero ni faros koncentran raporton pri la popolkomunumo. Ĉu tia maniero de redaktado estas bonvena aŭ ne? Ni tre deziras aŭdi viajn opiniojn kaj proponojn de temoj kiuj vin interesas. Krome, ni planas aldoni kolorajn bildpaĝojn kaj filatelian folion al ĉiu numero, enpresigi legajojn por komencantoj kaj aperigi humuraĵojn kaj aliajn legajojn por amuzo.

Ni daŭre klopodu kune kun la fervoraj legantoj kaj la pacamaj popoloj tra la tuta mondo por nova, pli granda venko en la nova jaro!

Sanon kaj feliĉon al vi ĉiuj!



“Dongfanghong”-traktoroj, faritaj de la Unua Traktora Fabriko en Luojang, estas transportotaj en diversajn lokojn tra la lando. Foto de Ĝang Kingjun

ANTAŬ la Liberiĝo fundamente ne ekzistis en Ĉinio maŝinkonstrua industrio, por ne paroli pri industrio de agrikulturaj maŝinoj. Tiam en la tuta lando troviĝis nur 1200 diversstipaj traktoroj importitaj el diversaj landoj. Eĉ ne estis sufiĉa kapablo por ilin ripari, por ne paroli pri fabrikado de traktoroj.

Dum la mallonga periodo de dekkvar jaroj post la Liberiĝo, la industrio de agrikulturaj maŝinoj de Ĉinio ne nur establiĝis, sed ankaŭ grandpaŝe disvolviĝis. Ĝi jam komencis liveron de agrikulturaj maŝinoj, inkluzive traktorojn, al niaj vastaj kamparoj. La unuapaŝa materia bazo de la agrikultura meĥanikigo jam estas metita.

ĈIAM KRESKANTA TRAKTOR-PRODUKTADO

La traktora industrio de iu lando estas la ĉefa marko de la disvolviĝo de ĝia industrio de agrikulturaj maŝinoj. Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) nia lando komencis la konstruon de la Unua Traktora Fabriko en Luojang. Krom tiu fabriko, kiu ĝenerale kompletiĝis jam en 1959, samtempe komenciĝis la konstruado de aliaj grandaj kaj mezgrandaj traktoraj fabrikoj.

De post 1958 la kvanto kaj kvalito de enlande produktitaj traktoroj rapide kreskas kaj rimarkinde pliboniĝas. Samtempe konforme al la karakterizaj trajtoj topografiaj de nia lando, fabrikiĝis diversstipaj traktoroj por labori en ebenaj kaj montaj regionoj.

Ni prenu nur la du provincojn Hebej kaj Hejlonggiang por ekzemplo. Nun en ĉiu gubernio de Hebej-provinco stariĝis traktoraj stacioj. Ili havas traktorojn kun sume pli ol 127,500 ĉ.p., t. e. duoblon de tiuj de 1958. La disvolviĝo en Hejlonggiang-provinco estas pli rapida. 60% el la tuta nombro de la popolaj komunumoj nun komencas uzi modernajn agrikulturajn maŝinojn. La nombro de la ĉevalpovoj de la traktoroj de la ŝtataj stacioj, laborantaj por la popolaj

FENG JUOKJUAN:

La Ĉina Industrio de

komunumoj jam atingis pli ol 120,000. Kompare kun tiu antaŭ la fondiĝo de la popola komunumo ĝi kreskis 2.2-oble. La disvolviĝo de la traktora industrio starigis solidan fundamenton por la meĥanikigo de nia agrikulturo.

LA MAŜINTIRATAJ AGRIKULTURILAJ

Dum energia disvolvado de la traktora industrio, Ĉinio ankaŭ forte klopodas por pliigi la produkton de diversaj agrikulturaj instrumentoj, bezonataj en la kamp-laboroj de plugado, semado, rikoltado ktp. Antaŭ la Liberiĝo, Ĉinio neniam produktis per si mem agrikulturilojn tiratajn de traktoroj, sed nun ni mem produktas pli ol cent specojn de agrikulturaj instrumentoj aplikeblaj por diversstipaj traktoroj.

Nun la enlande produktitaj agrikulturaj ilaroj bezonataj en la ebenkampaj laboroj, kiaj plugiloj, rastiloj, semiloj, rikoltiloj kaj tirataj ŝarĝoĉaroj, ŝprucigiloj ktp. jam sufiĉas por kontentigi la enlandajn bezonojn. Dum la lastaj jaroj en fabrikado de agrikulturiloj por uzoj sur la sulkaj kampoj en nordorienta Ĉinio kaj sur la akvaj kampoj en la sudo, oni ankaŭ faris esploran laboron kun sukceso. Kelkaj el la nove desegnitaj iloj jam estas sukcese provfaritaj kaj bona rezulto estas atingita en provuzado. Ekzemple la vinĉoplugilo por uzado sur akvo-kampo en la sudo estas oportuna ilo, ĉar la manipulantoj ne necesas iri en la kampon, kaj kontentige ĝi plenumas la plugadon kaj liberigas kamparanojn de la peza korplaboro. Ĝi jam estas sufiĉe vaste aplikata. Krom tio, en projektado kaj esplorado pri maŝintirataj ordinaraj plugiloj kaj rastiloj en multaj lokoj oni ankaŭ jam akiris bonajn rezultojn.

MOTOROJ POR IRIGACIO KAJ DRENADO


Depost 1958, sekve de la establiĝo de popolaj komunumoj, sur la bazo de kolektiva ekonomio, la meĥanika kaj elektra irigacidrenado multe disvolviĝis. Tio postulas ke la industrio de agrikulturaj maŝinoj liveru grandan kvanton da motoroj por irigacio kaj drenado, kiel ekzemple, dizeloj, bezinmotoroj, gasmotoro, k.t.p. La produkta kapablo de interno-brula motoro, t. e. la ĉefa speco de motoro por irigacio kaj drenado, rimarkinde kreskis dum la lastaj jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ankaŭ tia maŝino ne povis esti pogrande produktita en nia lando. Nuntempe povas produkti dizelojn ne nur la centraj ŝtataj entreprenoj, sed ankaŭ lokaj entreprenoj, kiuj

Agrikulturaj Maŝinoj

establiĝis kaj disvolviĝis post la antaŭensaltego de 1958. En Fugian-provinco, kies industrio estis tre malforta en la pasinteco, establiĝis nombro da lokaj fabrikoj dum la antaŭensaltego. De januaro ĝis aprilo de 1963 ili produktis malgrandajn dizelojn kun sume dekmil ĉevalpovoj, tio estas 54% pli multe kompare kun tiuj produktitaj en la sama periodo de la lasta jaro. Tiuj maŝinoj ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ sekegeco en la kamparo de la provinco en 1963. En kelkaj ĝiaj gubernioj nome Min-

Laboristoj de la Kajfeng-a Maŝinfabriko muntas siajn nove fabrikitajn kombajnojn.

Foto de Ĝang Kingjun



(Daŭrigo de p. 30)

NIA NOVA BUROESTRO

Kamarado eta Sun:

Mi konsilas al vi legi tiun ĉi artikolon de la prezidanto, kiu multe vin helpos por altigo de viaj laboro kaj politika konscio.

Kiam mi forpuŝis la slipon, en miajn okulojn ensaltis la titolo en grandaj literoj: "Zorgu la

hoŭ, Ĉangle, k. a. dank' al kelkjara senĉesa plimultiĝo de motoroj por irigacio kaj drenado, 90% de la akvoutiliga laboro estas jam meĥanikigita. La ekipaĵoj de irigacio kaj drenado per elektra energio de la tuta lando plimultiĝis en 1962 22-oble kompare kun tiuj en 1957.

Dum la kreskado de la produktokvanto de motoroj por irigacio kaj drenado, ankaŭ iliaj specoj plimultiĝis. De dizeloj prov-fabrikitaj antaŭ ne longe, la ekonomia kaj teknika normoj jam atingis progresintan nivelon internacian.

DUON-MEĤANIKAJ AGRIKULTURILLOJ

La industrio de agrikulturaj maŝinoj de nia lando estas ankoraŭ tre juna. La produkto de tiaj maŝinoj ankoraŭ ne povos plenumi la bezonon de la agrikultura produktado dum sufiĉe longa tempo. Tial, parale-


le kun la produktado de agrikulturaj maŝinoj, ni devas multe produkti mez-grandajn kaj malgrandajn agrikulturilojn kaj duon-meĥanikajn maŝinojn. Dum la tri jaroj de 1960 ĝis 1962 nia industrio por agrikulturaj maŝinoj kaj aliaj organizaĵoj kune fabrikis pli ol 30,000,000 duon-meĥanikajn agrikulturajn instrumentojn, kaj pli ol 700,000,000 pecojn da feraj malgrandaj terkulturiloj, kiuj ne nur ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ la naturaj katastrofoj dum la lastaj jaroj, sed ankaŭ garantias ke nia meĥanikigo de agrikulturo disvolviĝu firmaŝe.

Vivon de la Popolamaso; Atentu pri la Labormaniero". Ne povante min reteni, mi komencis ĝin legi. La vortoj de la artikolo estas tiel profundaj kaj intimaj al mi kaj ili ĉiuj penetris internen en mian koron.

Kvankam la slipo estis sen subskribo, sed mi bone komprenis, ke tio estis denove "novaĵo" de la nova buroestro!

TRAD. GUOZHU

Elektro en Kamparo



Elektra Transformatorejo sur la delto de la Perlo-rivero, Guangdong-provinco. Foto de Ĝeng Ĝensun

EN nova Ĉinio, multaj vilaĝoj jam ŝanĝis sian aspekton pro uzo de elektro. Sur la belaj kampoj staras vicoj da elektraj fostoj, kaj feraj turoj alte tenas en la aero elektrajn dratojn. Ĉe riveroj zumegas elektraj pumpiloj kaj maŝinoj de la elektraj drenirigaciaj stacioj, vomantaj ŝaŭmantajn akvokolonojn; el la laŭtparoliloj de tempo al tempo disaŭdiĝas belaj kantoj; en la vespero anstataŭ oleolampoj pli hele lumas la elektrolampoj.

DISVOLVIĜO DE DRENADO KAJ IRIGACIADO PER ELEKTRA ENERĜIO

La uzado de elektra energio en drenado kaj irigaciado en Ĉinio komenciĝis ĉefe de la antaŭensaltego en 1958. Antaŭ tiu jaro la kapacito de instalajoj de elektra drenado kaj irigaciado en la tuta lando estis nur 70,000 kilovatoj, sed en 1962, ĝi kreskis 22-oble,

la konsumado de elektroenergio en la vilaĝoj pligrandiĝis 13.8-oble ol en 1957, oni instalis elektrosendan linion de alta tensio por agrikultura uzo longan je pli ol 70,000 km. Nun en la kamparo de pli ol mil gubernioj kaj urboj oni jam uzas elektron kaj en multaj lokoj formiĝis elektrosenda reto, fondiĝis stacioj de elektraj drenado kaj irigaciado. Kun tio komenciĝis la ŝanĝo de la subevoluinta situacio de Ĉinio akvumi kampojn per homa aŭ besta fortoj.

La elektraj drenado kaj irigaciado en Ĉinio disvolviĝis laŭ la bezono en agrikulturo kaj la fonto de akvo kaj elektro. En la baseno de Tajhu, kie abunde produktiĝas rizo, pli ol dudek urboj inkluzive de Vugin kaj Vuhi de Giangsu-provinco kaj Giahing, Huĝoŭ de Ĝegiang-provinco jam efektiviĝis sian projekton de la elektraj drenado kaj irigaciado por 60-70% de la kampoj. En la delto de la Perlo-rivero en Guangdong-provinco, konata kiel "grenejo" de suda Ĉinio, oni jam konstruis pli ol 1,600 elektrajn pumpstaciojn, instalis altatensian linion de pli ol 4 000 km. La utilon-ĝuantaj kampoj nombriĝas je 270,000 hektaroj. En la legomproduktaj bazoj en antaŭurboj de Pekino kaj Ŝanhajo, oni jam ĝenerale uzas elektrajn instalajojn por drenado kaj irigaciado.

Nuntempe, en la ĉina kamparo, krom fiksj elektraj pumpstacioj, estas ankaŭ provizitaj diversaj elektraj akvoleviloj laŭ diferencaj kondiĉoj de diversaj lokoj. En la akvoriĉaj regionoj, kie riveroj kaj kanaloj interplektiĝas en reton, oni utiligas boatojn, ekipitajn per elektromotoroj kaj akvopumpiloj, kiuj cirkulas kaj servas laŭ la bordoj de la riveroj kaj lagoj. En Giangsu-provinco sola jam troviĝis en 1962 pli ol 9 400 tiaj boatoj, kiuj estas malkaraj kaj libere moveblaj. Sur la ebenaĵo de norda Ĉinio, kie estas seka sed abundas subtera fonto, konstruiĝis granda nombro da tiaj putoj


Ŝanhajaj elektrolaboristoj helpas konstrui transformatorejon por agrikultura distrikto.

Foto de Tang Junjen



Pli ol mil tiaj elektraj pumpstacioj de drenado kaj irigaciado estas konstruitaj en la delto de la Perlo-rivero.

Foto de Ĝeng Ĝensun



kun elektraj pumpiloj. Kaj nur en Hebej-provinco pli ol 8,500 putoj estis konstruitaj. En la montetaj regionoj apud grandaj riveroj, kie estas malalta la akvonivelo sed alta la tero, estas neeble konduki akvon por irigacio, oni faris irigaciajn konstruaĵojn kun pumpiloj, ekzemple en la montetaj regionoj de la provincoj Fugian kaj Siĉuan. La pumpstacio, konstruita en Ĝiangdu de Ĝiansu-provinco ekipita per ok elektraj motoroj, kun totala kapacito de 6,400 kilovatoj, estas la plej granda de sia speco en nuntempa Ĉinio. Ĝi laŭbezone pumpas akvon el Jangzi-rivero por irigacii kampojn, kaj eldreni la amasigitan akvon el kavaj teroj.

En la lastaj jaroj, la instalajoj de elektra drenado kaj irigaciado plenumis tre gravan rolon en la lukto kontraŭ sekeco, superakvumo kaj por garantii la agrikulturan produktadon. Ekz-e Guangdong-provinco suferis en 1963 la plej malofte renkontitan sekegecon de post pli ol sesdek jaroj, ĉar pluvo mankis dum sep sinsekvaj monatoj. Tamen eĉ en jaro de tia sekeco oni rikoltis la fruan rizon pli multe ol en 1962. La fidon kaj volon de la kamparanoj ege firmigis la elektro-pumpstacio por venki naturan katastrofon. La kamparanoj vidis el tio ke la forto de la homoj superas la naturon.

VASTA UZO DE ELEKTRO EN LA KAMPARO

La elektra drenado kaj irigaciado ne nur plifortigas la povon en lukto kontraŭ katastrofo, sed ankaŭ akcelas la agrikulturan produktadon. Granda labor-

forto ŝparita povas esti uzata por la subtila kaj zorgema kultivado, kolektado de pli da sterkoj, pliigo de duobla plantado kaj por tiel multe pligrandigi la rikoltokvanton. Krom tio, la ŝparita laborforto povas esti utiligita ankaŭ por disvolvi la flankajn produktojn kaj pliigi la enspezon de la kamparanoj kaj plibonigi ilian vivon.

La enkonduko de la elektroenergio en la vilaĝoj ankaŭ ŝanĝis la vivmanieron de la kamparanoj. Nuntempe, en la regionoj, kie trapasas la elektrosenda linio oni uzas elektron ne nur por drenado kaj irigaciado de la kampoj, sed ankaŭ por draŝado, senŝeligado de rizo, muelado de faruno, sengrajnigado de kotono, elpremado de oleo kaj prilaborado de furaĝo, ktp. Tio plibonigas la laborkondiĉon de la kamparanoj, kaj laŭgrade ilin liberigas el la peza korpolaro. Laŭ la statistiko de Ĝilin-provinco la senŝeligado de rizo per elektro dudekoble pli bone efikas ol tiu per bestforto kaj multe malpliigas laborstreĉecon de la homo. La komunumanoj tre ĝin laŭdas kaj bonvenigas. Krom kontentigi la bezonojn de elektro en agrikultura produktado, multe disvastiĝas en la lastaj jaroj ankaŭ la uzado de elektro en iluminado en la vilaĝoj. En multaj regionoj, kie la laŭtparoliloj estis instalitaj en ĉiuj vilaĝoj, la kamparanoj povas ĉiutage aŭskulti la disaŭdigon pri gravaj aferoj de la ŝtato. Kelkaj komunumanoj havas jam sian propran kinotrupon, tiamaniere la membroj de la komunumo povas rigardi la filmojn post laboro. La elektro ja ege pliriĉigas la vivon de la kamparanoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *


BUDHISTA KUNVENO DE DEKUNU AZIAJ LANDOJ

De la 17-a ĝis la 19-a de oktobro, 1963 okazis en Pekino Kunveno de Budhistoj el Dekunu Aziaj Landoj nome Kamboĝo, Ĉinio, Indonezio, Japanio, Koreio, Laoso, Nepalo, Pakistano, Sud-vjetnamio, Tajlando kaj la Vjetnama Demokratia Respubliko. La kunveno estas malfermita je la vespero de la 17-a en la fama Fajuan-templo konstruita antaŭ pli ol 1,200 jaroj.

En la kunveno, la budhistaj delegacioj kaj laikaj budhistoj aŭskultis raporton de la estimata Thich Thien Hao el Sud-vjetnamio, pri kruelajoj kontraŭ la budhistoj faritaj de Diem-reĝimo. Pro tio la kunveno faris "Apelon al la Budhistoj en la Tutmondo", kiu kondamnas la Diem-reĝimon kaj apelante, ke oni malhelpu la persekutadon de la sud-vjetnama reĝimo al la budhistoj kaj ke la baza homa libero de religia kredo estu garantiata tie.

LA UNUA BALEN-ŜIPO EN ĈINIO

La unua memfarita balen-ŝipo de Ĉinio estas finkonstruita en Ŝanhajo. Oni ĝin baptis per la nomo Juanlong. Ĝi estas destinita por la Balenkapta Taĉmento de la Dalian-a Akvoprodukta Kompanio, fiŝanta sur la Flava Maro kaj la Orienta Maro. Ĝi povas daŭre labori sur la maro pli ol unu monaton, kaj normale funkcii eĉ dum ventego 8a-grada.



Solena inaŭguro de la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj.


Foto de Ĝoŭ Ĉangping

La Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj

De la 10-a ĝis 22-a de novembro, 1963, en Djakarta, la tropika ĉefurbo de Indonezio okazis la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj.

Li Gijuan, ĉina sportisto rompis la mondrekordon en la manprena pezlevo de la plej malpeza klaso per atingo de 108 kg.

Foto de Li Ĉangjong




Tiun grandan sportkunvenon partoprenis 2295 gesportistoj el 49 landoj kaj regionoj de kvar kontinentoj.

Montriĝis, ke ĉiu el la partoprenintaj landoj havas siajn majstrojn en tiu aŭ alia speco de sporto. Ekzemple, en konkurso sume de 34 specoj eniris la vicon de la unuaj ses konkurantoj gesportistoj el

Li Heung Chun, korea sportisto rompis la mondrekordon en la jetpezlevo de la plej malpeza klaso per atingo de 141 kg.

Foto de Li Ĉangjong





He Long, vicĉefministro de Ĉinio, varme akceptata je sia alveno al Djakarta.

Fotoj de Ĝoŭ Ĉangping

Jong Gaŭtang (la dua dekstre), ĉefo de la Ĉina Atleta Delegacio partoprenanta en la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj, estas bonvenigata de Maladi (la dua maldekstre), Ministro de Sportoj kaj aliaj ŝtatofuncistoj kiam li atingis Djakarta.

dudek landoj. Kvin mondaj rekordoj estas renovigitaj, kaj des pli multaj enlandaj rekordoj estas rompitaĵoj.

Dum la sportkunveno sin prezentis ankaŭ belegaj teatraĵoj kaj aliaj spektakloj.

LA NOVA SPIRITO ĈE LA NOVA SPORTKUNVENO

Okulfrapa trajto tute malsama ol tiu de iuj aliaj sportaj konkursoj de la mondo karakterizas la kunvenon: ĉiu partoprenanta lando, ĉu granda aŭ malgranda, havis egalan rajton en la sportkunvenaj aferoj. Ĉiuj punktoj de la statuto kaj reguloj estis deciditaj laŭ la opinioj de ĉiuj landoj partoprenantaj en la spirito de demokratia interkonsiliĝo.

Ne estis rasa distingo en la kunveno. La sportistoj de la blanka, flava, nigra aŭ bruna rasoj ĉiuj ĝuis egalecon. Iu sportisto el Dominiko diris ke ili estis ofenditaj de rasistoj survoje al Djakarta; sed ĉi tie en la sportkunveno ili ĝuas intiman amikecon.

Sin Kim Dan, korea sportistino rompita per 1 minuto kaj 59 sekundoj en la virina 800-metra kurado la mondan rekordon de 2.12 minutoj, kiun ŝi mem tenis antaŭe.

Foto de Li Hjueĝi



La sportistoj ne nur konkuris pri sia kapablo sed ankaŭ pri sia persisteco, ĉie montriĝis freŝa vivo kaj vigeleco de la novaj fortoj. Dum la Marathon-kurado, 42 km. kaj 195 m. longa, en varme de pli ol 35 gradoj C., unu indonezia sportisto estis en la fronto ĉekomence, kvankam poste superita de iu alia, tamen li ne perdis esperon. Li tiel fervoris en la kurado, ke li eĉ demetis siajn ŝuojn kaj



Li Ŝulan, ĉina arkpaŝtino rompita la mondan rekordon de la virina 30-metra duobla pafado de 72 sagopafoj per sia atingo de 628 poentoj en la Sportkunveno.

Foto de Tang Likuj




La Ĉina Akrobata Trupo venas por prezentado por la sportistoj de la Sportkunveno. Foto de Tang Likuj

rapidis antaŭen en la brula varmo. Multaj rigardantoj — viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj, forte lin aplaŭdis. Kaj tiu kamparana sportisto fine gajnis la trian honoran lokon de la kurado. La ĉefo de la atleta delegacio de Somalio M. J. Asai diris: “Nenion postlasis al ni la koloniistoj, kaj ne estas escepto en la sfero de fizika kulturo. Tamen ni komprenas, ke ni devas komenci kun firmeco kaj rapide kuratingis la aliajn.”

KAJ RIVALOJ KAJ AMIKOJ

Kiam falis la nokta vualo kaj brilaj steloj palpebrumis sur la ĉielo, en la Internacia Vilaĝo nove konstruita por loĝado de la atletaj delegacioj el diversaj landoj. Ĝojaj renkontiĝoj okazis inter du-, tri- eĉ kvar-landaj sportistoj. Oni kantis kaj dancis. Aplauĉoj tondris. Okazis multaj intersanĝoj de donacoj, ĉemizoj, ledŝuoj, subskriboj, iuj eĉ petis ke oni subskribu sian nomon sur la numero de ilia sportvesto por memorigo. La ĉinaj sportistoj ankaŭ okazigis ĝojajn renkontiĝojn kun siaj kolegoj el



Ĉinaj plonĝistoj Liang Bajhi, Li Ĝengde gaje babilas kun anoj de la futbala teamo el Somalio.

Foto de Ĝang Giahua

Ĉilio, Koreio, Gvineo, Vjetnamio, Kamboĝo, Filipinoj, Sovetunio, Japanio kaj multaj aliaj.

Tia sceno vere kortuŝa vidiĝis same sur la sportejo.

Kiam la virina konkurso pri 45-kilometra surŝosea biciklado estis en progreso, la korea sportistino Ju Jinzi, biciklanta en la antaŭo, terure soifis pro la arda konkuro, sed akvo mankis ĉe ŝi. Tiam ĉina sportistino Ĝang Ĝenguj estis strebanta por kuri antaŭ ŝin, ekvidis ke la korea knabino volas trinki, kaj tuj decidis doni al ŝi sian botelon, sed ŝi trovis kun bedaŭro ke ŝia botelo estas jam malplena. Ĝuste tiam iu indonezia sportistino post ŝi tuj kuratingis kaj donis sian akvujojn al Ĝang kaj tiu ĉi transdonis ĝin al Ju Jinzi.

Bone diris la bolivia sportisto Eduardo, ke “Oni partoprenas la sportkunvenon ne por medaloj sed por trovi amikecon.”

NEESTINGEBLA TORĈO

La Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj estis proponita de Sukarno, la prezidanto de Indonezio, kaj ĝi trovis varman subtenon de la nove leviĝantaj landoj. Ĉinio ĉiam aktive ĝin subtenas. La

Volejbalo-maĉo inter kuba (dekstra) kaj libana (maldekstra) teamoj.

Foto de Liu Ĉangĝong

Indonezia biciklista teamo gajnis kolektivan ĉampionecon en la konkurso de la vira 100-km. surŝosea biciklado kun atingo de 2 horoj 30 minutoj kaj 21.4 sekundoj.

Foto de Liu Ĉangĝong






Ĉinaj kaj indoneziaj volanistoj interbabilas en litĉambro de la Internacia Vilao. Foto de Li Ĵujfeng

imperiistoj faris siaflanke serion da minacoj, timigoj kaj subfosoj, sed la kunveno sukcesis konkerinte ĉiujn malhelpojn. La signifo de la tutmonda sportkunveno organizita de la nove levigantaj landoj mem estas grava en tio ke ĝi komencis por la internacia sporto novan eraon, frakasis la intrigon de la imperiistoj por monopoligi la internacian sporton, kaj plisolidigis la amikecon inter ĉiuj popoloj por ke ili pli firme unuiĝu sub la standardo de la Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj.

La 25-an de novembro, komunikado publikigita de la Unua Kunsido de la Rezentantoj de la Sportkunveno diris ke oni faris decidon establi konstantan organizaĵon por la internacia sporto kaj la Unuiĝinta Araba Respubliko estas komisiita por prepari la duan sportkunvenon. La torĉo de la sportkunveno estas, kiel la devizo en ĝia statuto ke "Ĉiam Antaŭen, Neniam Retroen!"



Minarni, indonezia ĉampiono kaj Liang Hiaŭmu, ĉina subĉampiono de la virina unuopa konkurso de volanludo en la Unua Sportkunveno. Foto de Li Ĵujfeng

Poŝtmarkoj por la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj

La 100-a serio de pm. emisiita (17-XI-1963) de la Ĉina Poŝto. (la dekstra originale estas 52 × 31mm.; la subaj — same kiel la originalaj)





Nokto ĉe la Kontona Ŝipkonstruejo. Foto de Ĝu Han

La Mara Transportado de Ĉinio

GI ĜE


EN lastaj jaroj la ĉina martransportado faris grandan paŝon pluen laŭ la vojo de konstruado per propraj fortoj. En la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958—1962) plimultiĝis novaj ŝipoj sur marlinioj, novaj havenoj kaj kajoj estis konstruitaj, kaj novaj havenaj mekanikajoj estis instalitaj. Sur internaciaj marlinioj aperis ankaŭ transoceanaj ŝipoj de Ĉinio.

Nun, laŭ la marbordo de pli ol dek kvar mil kilometroj jam estis formita primare martransporta reto el pli ol sesdek marlinioj kun periode aŭ neregule veturantaj ŝipoj, liganta pli ol dudek grandajn kaj mez-grandajn havenojn kiel Tiangin, Kingdaŭ, Fuĝou, Ningbo, Ĝangiang, Hajkou ktp., kun Ŝanhajo, Kantono kaj Dalian kiel nodoj, kaj plenumanta ĉiujare gigantan transportan taskon. En la jaro 1962 sola la kemiaj sterkoj kaj agrikulturaj drogoj transportitaj de la ŝipoj de la Mara Transporta Oficejo atingis jam 170 mil tunojn, kaj ankaŭ tre multe da karbo, ŝtalproduktaĵoj, ligno kaj grenoj estas transportitaj de

la marŝipoj. Krome multe da pasaĝeroj veturas per ili. En ligo kun la rivera transportado la mara transportado multe kontribuis en subtenado al la agrikulturo. En ĉiu jaro ĉirkaŭ 30 milionoj da tunoj da varoj por subteni la agrikulturan produktadon kaj kontentigi ĉiutagan konsumadon de la kamparanoj, estas transportitaj laŭ akvaj vojoj.

Angulo de la Ŝanhaja haveno.

Foto de Ki Caj



Transoceanaj linioj de transportado de Ĉinio al Afriko, Eŭropo kaj Sudorienta Azio komenciĝis en 1961, kaj pasaĝeraj kaj kargoportaj ŝipoj transoceanaj jam atingis pli ol 20 havenojn de 15 landoj kaj regionoj kiel Vietnamio, Albanio, Pollando, Indonezio, Jemeno, Gvineo, Belgio, Anglio ktp. "Paco", la unua vaporŝipo de Ĉinio kiu atingis okcidentan bordon de Afriko, vojaĝis entute 10 mil marmejlojn, el ĉina haveno, tra la Suda Ĉina Maro, Hindia Oceano, Mediteraneo kaj Atlantiko, elteninte la provadon de uraganoj kaj ondegoj.


En la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953—1957) ĉinaj teknikistoj komencis fari projektojn de diversaj grandatipaj ŝipoj, kaj jam multe atingis en la lastaj jaroj. La nomita kargoŝipo "Paco", kun ŝarĝokapacito de 6000 tunoj kaj enlande provizitaj ekipaĵoj, kiu faris transoceanan vojaĝon al Okcidenta Afriko lastjare, estas konstruita de la Daliana Ŝipfarejo. Dume, ankaŭ la Ŝanhaja Giangnan-Ŝipfarejo fabrikis kargoŝipojn kun egala ŝarĝokapacito. Tiuj ŝipoj estis konstruitaj per tre alta rapideco, kaj pruviĝis per la vojaĝo ke iliaj teknikaj kvalitoj kaj funkciado estas tre bonaj.

En la periodo de la Dua Kvinjara Plano, Ĉinio jam komencis projekti kaj fabrika oceanajn ŝipojn kun ŝarĝokapacito de 10,000 tunoj. Kun la disvolviĝo de ŝipkonstrua industrio kaj la pliigo de ŝtata investado por aĉeti ŝipojn, la ŝiparo de mara transportado jam rimarkeble kreskis dum la lastaj jaroj. En 1962 la totala ŝarĝotunaro de la ŝipoj, kiuj vojaĝis inter la nordaj marhavenoj, jam duobliĝis kompare al tiu en 1957.

Dum la tempo de la Unua Kvinjara Plano oni jam multon atingis en la konstruado de novaj kaj plivas-

tigo de malnovaj marbordaj havenoj de Ĉinio, kaj sur bazo de tio, la ŝtato daŭrigis la investadon. La ŝarĝa kaj malŝarĝa kapacito de la havenoj ege altiĝis dum la lastaj kvin jaroj. En la havenoj Ŝanhajo, Tiangin, Huangpu kaj Kinhuangdaŭ estis konstruitaj novaj profundakvaj kajoj. Kaj la mekanikaj ŝarĝiloj en diversaj havenoj pliiĝis en granda skalo. En kelkaj havenoj estis plivastigitaj kaj konstruitaj varotenejoj kaj magazenoj, kaj estis alkonstruitaj novaj fervojaj linioj por altigi ilian transigan kapablon. Ekde 1959 al la fame konata Nova Haveno de Tanggu estas komencita la duaetapa konstruado, kaj ĝiaj ĉefaj punktoj jam estis plenumitaj lastatempe. Ĉe ĝia profundakva kajo nove konstruita estas eble alboridiĝi samtempe por kvin dekmiltunaj ŝipoj, la longeco de la kajo-linio duobliĝis kaj la fizionomio de la haveno pli imponiĝis.

Ekde la antaŭensaltego la rapida disvolvo de la mekanikigo de ŝarĝo kaj malŝarĝo estas unu el la elstaraj atingoj en havena konstruado. Post la sukcesa plenumiĝo de la Unua Kvinjara Plano, nur 25% de ilia totala ŝarĝ- kaj malŝarĝ-a laboro de la dek maraj havenoj estis faritaj per mekanikaj instalaĵoj, sed nun 70% jam el la totala kvanto de ŝarĝ- kaj malŝarĝado estas farataj per diversaj maŝinoj. La laboristoj kaj teknikistoj de la Kingdaŭ-haveno mem projektis kaj konstruis ekipaĵojn por karbotransporta galerio, kaj per tio kreis novan rekordon en enŝipigo de karbo. Aplikante tian mekanikigitan ekipaĵon de karbotransporto per galerio oni bezonas nur malmulte da laboristoj por ŝarĝi dekmiltunan kargoŝipon kaj la tuta procedo daŭras nur dekelkajn horojn, kaj la plej rapida rekordo estas nur 8 horoj. En la pasinteco por plensarĝi dekmiltunan ŝipon per karbo necesis kelkcent laboristoj por labori dum kelkaj tagoj.



Havenkajo de Kinhuangdaŭ de Hebej-provinco, kie vartrafiko multe viglas.

Foto de Ŝi Panki

30 Jaroj sur Tongtian-rivero

— Ĝojoj kaj malĝojoj de unu maljuna pramisto —

CE unu kruta pramejo de Tongtian-rivero, la plej supra fluejo de Jangzi-rivero, la maljuna tibetano, pramisto Tando, travivis jam 30 plenajn jarojn.

La pramejo ne estas iu ordinara. La fluo galopanta malsupren de la alta fonto ĉirkaŭ 6,000 metrojn super la marnivelo, enkorpiginta en si survoje centojn da grandaj kaj malgrandaj alflujaj riveroj kaj pasinta zigzage tra multaj montgorĝoj, alvenas ĉi tien kiel giganta torento, kiu muĝas, ŝaŭmas kaj furioze impetas antaŭen kvazaŭ akvofalo, kiu ne povas sin reteni dum la malleviĝo eĉ en mil lioj. La loko estas la sola trairejo de Hining, la ĉefurbo de Kinghaj-provinco, al Juŝu, kaj ankaŭ la gorĝo tra kiu la Juŝua Tibetana Aŭtonoma Subprovinco komunikigas kun la aliaj lokoj en kaj ekster la provinco.

“Jen plenriver’ da akvo, — sed la duono estas larmoj!”

Estas diro: “Facilas ja trapasi vojon ĉian, escepte la pramejon de Tongtian.” Ĉi tie, ĉe la bordo sin trovas la Sutro-sunuma Roko, sur kiu Hjuanĝuang la bonzo de Tang-dinastio, sekigis siajn alpetitajn sutrojn en sia revenvojo post falo en la riveron. Krome, legendo estas cirkulata en la loko ke en sia vojaĝo al Tibeto por edziniĝi al la tibeta reĝo Sunzan Kampo, Princino Venĉeng estis haltigita de la furioza torento de Tongtian-rivero, kaj poste ŝi trapasis la riveron nur dank’ al la helpo de dio, kiu dispartigis la fluon per sia vipo.

En malnovaj tempoj estis multe da pramistoj, kiuj perdis siajn vivojn en Tongtian-rivero. Eĉ hodiaŭ, en la apudaj vilaĝoj de la pramejo oni facile povas trovi ankoraŭ iliajn postlasitajn orfojn kaj vidvinojn. Tio klarigas, kial oni asertis ke duono de la akvo estas larmoj.

En unu nigra nokto antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam la rivero estis baldaŭ glaciigota, Tando kaj lia parenco malgranda Sonan kuntiriĝis en siaj ŝafeloj kaj kuŝis en kaverno proksima al la pramejo. Ekstere vento muĝis furioze. En ilia duondormo, subite en-trudiĝis en la kavernon grupo da reakciaj soldatoj kaj ordonis ilin veturigi ilin trans la riveron. Tando timis ke en tiel nigra nokto estas granda risiko trans-

pasi la furiozan torenton per flosa*. Sed la soldatoj tute ne aŭskultis lin kaj skurĝe pelis lin el la kaverno kune kun malgranda Sonan.

Tando kaj malgranda Sonan kunportis po unu felfloson kaj stumble venis al la riverbordo. Tiam ĉe la bordo jam aperis maldikaj glacioj. Kiam Tando rigardis dekstren kaj maldekstren por trovi taŭgan lokon por surakvigi la floson, pezaj skurĝofrapoj jam falis sur lian dorson, tiel ke li devis rapide ĵeti la floson sur la riveron sen plua konsidero. La troŝarĝitaj flosoj turniĝadis en la fluo kaj la pramistoj estis devigataj penege movi la remilojn per frostiĝintaj manoj. Tando estis maltrankvila pro la timo ke, se hazarde la ŝarĝaĵoj estos malsekigitaj, eble ripetiĝos la sperto ke oni jungos ilin kvazaŭ brutojn.

Sed kiu atendis ke al ili okazis io ankoraŭ pli malfeliĉa! Kiam ili alvenis al la mezo de la rivero, rapide alruliĝis glaciaj pecoj de la supra fluejo. Tando estis sperta pramisto kaj lerte direktis la floson per la remilo jen dekstren jen maldekstren por eviti kunpuŝiĝon kun la glaciaj pecoj, sed la 17-jara malgranda Sonan troviĝis en maltrankvilo. Jen peco da glacio pli granda ol la flosa, rekte koliziis kontraŭ la flosa de Sonan. Antaŭ ol Tando havis tempon por krei “Atentu!”, malgranda Sonan jam estis ĵetita en la torenton. Apenaŭ oni povis vidi kelkajn baraktosvingojn de liaj manoj super la akvosurfaco, tuj lin forportis la furioza torento sen postsigno.

“Mi vetas, ke la mondo nepre ŝanĝiĝos!”

En la somero de 1950, venis alia trupo, la Popola Liberiga Armeo, kiu estis por Tando nekonata. Kiel kutime Tando provis sin kaŝi kun siaj kamaradoj. Sed la soldatoj de la Popola Liberiga Armeo alvenis vizite al lia hejmo. Tando estis embarasita, kiam tiuj soldatoj ĉiuj tre afable kaj respektive nomis lin “Maljuna Avo”. Kaj ĉifoje li ne estis regalita per batoj. Tando trankvile metis sian floson sur la riveron kaj transportis la soldatojn al la alia bordo. Kvankam li ŝvitegis pro energia remado, li tamen ne sentis sin laca.

* Flosa farita el aerplenigitaj sakoĵoj el bovfejoj.

Post la veturo la soldatoj lasis al li farunon kaj monbiletojn. Tiuvespere ludante la ricevitajn monbiletojn kun granda plezuro Tando mistere anoncis al siaj kamaradoj:

“Mi vetas, ke la mondo nepre ŝanĝiĝos!”

Kompreneble la veton gajnis Tando. Ekde tiam ili ricevas sian fiksitajn salajron, ne plu portas la eluzitajn ŝaf-felojn hereditajn tra tri generacioj kaj anstataŭe vestas sin per okulplezurigaj surtutoj el *puluo***. Ili ekloĝis en novajn domojn konstruitajn de la popola registaro sur la bordo kaj komencis porti kun si la laborprotektajn objektojn, kiaj ekzemple savvestoj, pluvmanteloj, kaŭĉukaj botoj, gantoj. Antaŭe, ĉe malsaniĝo la pramistoj povis fari nenion krom kuŝi en kaverno por atendi la alvenon de la morto. Nun se iu suferas malsanon, lin kuracos han-nacia kuracisto el malproksima loko. La plej elstara ŝanĝiĝo estas tamen tio ke en la nova socio ilia laboro estas respektata de la publiko kaj ili neniam plu ricevas skurĝobatojn.

Tando ankaŭ rimarkis interalie ke antaŭe la elportataj varoj estis ege pli multaj ol la enportataj, sed nun, estas tute alie. Precipe post la konstruiĝo de la grandaj pramoj en 1956, plensarĝitaj kamionoj alvenis unuj tuj post aliaj kaj post la transiro de la rivero ili tuj direktis sin rekte al la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco. El la enportataj varoj troviĝas manĝaĵoj, uzajoj kaj diversaj maŝinoj, kiuj venis el Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Hining kaj aliaj lokoj de la patrolando.

Kiam Tando promenis sur stratoj de la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco, li pretervole ekmemoris pri la antaŭliberiĝa aspekto de la urbo, kiu tiam montriĝis kiel kaduka soleca vilaĝo formita de nur kelkaj terdomoj, sed nun tie staras senfinaj vicoj da nove konstruitaj domoj. En la urbo Tando jen vizitis bone ekipitan hospitalon por sin kuracigi, jen venis en magazeno kun abunda provizo de komercaĵoj por aĉeti bezonatajn ĉiutagajn necesajojn. Krome, li aŭdis ankaŭ la ĝojan bruegon de traktoroj sur la kamparo kaj de la maŝinoj en fabrikoj.

Prezidanto Maŭ Starigis la Ĉielarkon

“Oni konstruos ponton super Tongtian-rivero!”

En la nokto, kiam la pontkonstruaj teknikistoj alvenis al la bordo de Tongtian-rivero kun amaso da materialoj kaj in-

stalaĵoj kaj starigis siajn tendojn, la maljunulo Tando, kiu sate travivis maltrankvilojn kaj suferojn sur Tongtian-rivero, longe ne povis endormiĝi. Li cerbumadis, ĉu vere oni povos konstrui ponton super Tongtian-rivero. Ĉu la aĝuloj ne asertis: “Kiu kapablas levi ŝtuparon ĝis la nuboj, tiu povus konstrui ponton super Tongtian-rivero.” En la sekvanta tago kiam la pontkonstruantoj vizitis lin por peti informojn pri lokaj hidrologiaj† detaloj, Tando unue demandis al la vizitantoj: “K-doĵ, ĉu vere oni povos konstrui ponton ĉi tie?” “Avo, kredu! Se oni povos konstrui la Grandan Ponton super Jangzi-rivero ĉe Vuhan, do oni povos konstrui ponton ankaŭ ĉi-loke!”

Efektive, post unu jaro, apud la Sutro-sunuma Roko jam starigis pontbazo monstre giganta. Nur tiam la maljunulo ekkredis.

La ponto fine estis elkonstruita. La tibetanoj neniam antaŭe vidis tiel grandan konstruaĵon kaj ili konkure venis ĉi tien per veturiloj aŭ ĉevaloj kunportante siajn tendojn, de dekoj kaj eĉ centoj da lioj malproksime por vidi la ponton. Tando laŭte diris al ili: “Ĝi estas la ĉielarko starigita de Prezidanto Maŭ!”

Proksimiĝis la tago de inaŭguro de la ponto al la trafiko. Antaŭvespere, Tando laŭkutime remis sur la rivero fojon post fojo por transigi kamionojn per la pramo. Li fikse rigardis al la grandioza korpo de la ponto kaj emocie murmuris: “Jen la lasta tago kaj la lasta remado de la 30 jaroj!” La maljuna pramisto laborinta 30 jarojn neniel povis regi sian

(Daŭrigo sur p. 22)

** *Lanteksaĵo de tibetanoj.*

† *Hidrologio: la branĉo de fizika geografio, kiu traktas pri la akvo de la terĝlobo.*

La pontego sur Tongtian-rivero, konata kiel la “Ponto de Feliĉo”.

Foto de Li Ziking



En Vilaĝo de la "Nomada Popolo"

— Okaze de la deka datreveno de la fiksloĝiĝo de la olunĉunoj —

ESTIS preskaŭ vespero kiam ni alvenis al la nova vilaĝo de olunĉunoj—Hin-o. Tiam, la Malgranda Hing-an-montaro baniĝis en la radioj de la subiranta suno kaj la ĉielo estis plena de koloraj nuboj, la pejzaĝo estis rave bela. Malgraŭ la laco post vojaĝo de 90 kilometroj, post engluto de taso da teo, ni tuj rapidis rigardi la tritikajn kampojn en la montaro akompanate de kamarado Guan, la vicsekretario de la Partikomitato de la nacimalplimulta vilaĝo.

Survoje k-do Guan al ni rakontis, ke la olunĉunoj ne kulturis teron en la pasinteco, sed nur ĉasis en la montaro. Ili manĝis viandon de ĉasaĵoj, sin vestis per feloj, kaj loĝis en tendoj. Ili vivis la mizeran vivon generacion post generacio ĝis 1945.

"En la montaro estis tre malfacile akiri grenon kiel nutraĵon," diris k-do Guan kun suspiro, "oni devis iri kelkdek kilometrojn tra montvojo por inter-




Kuracisto vizitas bebon por sankontrolo.

Foto de Hu Vej

Ĉasistoj elrajdas.

Foto de Hu Vej kaj Hu Gongcaj



ŝanĝe ricevi kelkdek kilogramojn de milio, bezonota dum la vintro, printempo kaj somero. Milio estis pli kara ol oro! Kaj nun?" Li daŭrigis fingromontrante antaŭen: "Jen tie ni havas nian propran tritikan kampon!"

Vasta ora lago el tritiko sterniĝis antaŭ ni. Tiel brilaj estis la oraj ondoj de la tritiko kaj ebriiga ĝia aromo.


"Vi eble scias, ke antaŭ dekkelk jaroj, ni olunĉunoj ankoraŭ vivis la primitivan nomadan vivon, kaj nun ni kvazaŭ per unu paŝo suriris la ĉielon. En 1953, la popola registaro konstruigis pli ol okcent domojn en la Granda kaj Malgranda Hing-an-montaroj, kaj establis sep novajn vilaĝojn por olunĉunoj. De tiam, ni ne nur ellernis kultivadon, kaj ankaŭ uzadon de traktoroj."

Rigardante al la tondrantaj traktoroj k-do Guan ne povis kaŝi siajn kontenton kaj fieron.

Reveninte de la tritikokampo, ni ĝuis dormeton. Ĉe mia vekiĝo, la bruado de motoroj ankoraŭ ŝvebis ĉirkaŭ miaj oreloj. Mi eliris kaj trovis ke tio estas la bruo de la dizelo instalita en la grenaprilaborejo.

La olunĉunoj komencas agrikulturan produktadon post fiksloĝiĝo.

Foto de Vu Jumin



Ĉiu familio nun havas sian novan loĝejon helan kaj puran.

Foto de Vu Jumin



Tiam la nokta vualo jam falis. La vasta sennuba ĉielo estis plena de steloj trembrilantaj. Ĝuste kiam mi volis reiri en mian ĉambron, subite brilis en la vilaĝo elektrolampoj. Ĉu la olunĉunoj iam antaŭe vidis elektrolampojn, kaj la veran "lumon" en la vivo? Tiam oni nur bruligis kampadan fajron, por varmigi sin en la vintro, kaj dispeli moskitojn en la somero. Por dek jaroj, dudek jaroj, tridek jaroj. . . . la olunĉunoj, de la naskiĝo ĝis morto, pasigis tiajn senlumajn noktojn en siaj tendoj.

La nokto densiĝis. Mi enprofundiĝis starante sub la svelta betulo en meditado.

Kiam mi vekigis en la sekva mateno, mi aŭdis enlĝite la klaran sonoron matenan.

"Ha! Signalo por matenmanĝo?" ni rapide leviĝis.

"Ne! La leciono de la elementa lernejo komenciĝas."

.....

Spirante la freŝan aeron de la mateno, ni pasis preter la pordo de la elementa lernejo. La suno jam

leviĝis. Sub la lumaj fenestroj, naivaj ridetantaj vizaĝoj rigardas al la podio, sur kio staras olunĉuna instruisto, kiu gvidis la infanojn voĉlegi: "Ni infanoj de la nova Ĉinio. . . ."

Ĉifoje, al miaj oreloj venis la klaraj sonoj de voĉlegado.

. . . . Ĉu tiuj estis la plej belaj sonoj de aŭtuno en la malgranda Hing-an-montaro?

Venis la vespero de la deka de septembro. Sur la riverbordo brulis kampadaj fajroj — estis celebrado laŭ la kutimo de la olunĉunoj okaze de la deka datreveno de fiksloĝiĝo ĉi tie.

Kantoj kaj dancoj alternis; la fajro ruĝigis la ĝojplenajn ridetantaj vizaĝojn; larmoj de maljunulo falis en lian vinglason.

"Avo, vi ploras?"

"Ne, malsaĝuleto, mi ridas." Karesante la kapon de la infano, la maljunulo al ni diris: "Kamaradoj, mi havas nun okdek kvin jarojn, travivinte kelkajn dinastiojn, kaj neniam vidis ion similan kiel mi vidas hodiaŭ. En la pasinteco, la imperiestroj, la diablaj japanoj kaj la Kuomintang-anoj, ĉiuj nomis nin 'Arbarvaguloj'. Jes, en tiuj tempoj kun ĉevalo ŝarĝita per la tuta posedaĵo de la familio, oni vagis jen orienten, jen okcidenten, sekvante la piedsignojn de sovaĝaj bestoj; kiel mizera estis la vivo! Kaj la vojo antaŭ ni fariĝis ĉiam pli mallarĝa! Mi klare memoras, ke dum la dekkvarjara regado de la pupa Manĉukuo, mortis pli ol duono de kvarcent olunĉunoj en nia regiono. Baldaŭ ĉiuj estis ekstermiĝontaj. Tute ne atendite, ĝuste kiam ni estas en danĝero de perejo, alvenis la savanto, la Komunista Partio. Kaj venis kun ili niaj bonaj tagoj! Ni nun havas niajn proprajn domojn, kooperativon, kuracejon, elementlernejon, kaj aŭditorion. . . . Estis nur dek jaroj ĝis nun post nia fiksloĝiĝo! Kio fariĝos post aliaj dudek aŭ tridek jaroj?"

"Tiutempe mi plenkreskos," ĝojis la infano.

"Kion vi faros kiam vi plenkreskos?" ni demandis.

"Mi fariĝos ĉasisto, mi kaptos la plej belan birdon por prezenti ĝin al prezidanto Maŭ!"

.....

Impresoj en Hiroŝima

—NOTOJ PRI LA VIZITO AL HIROŜIMA DE LA PEKINA AKROBATA TRUPO—



Membroj de la Ĉina Akrobata Trupo almetas salutan girlandon antaŭ la monumenton dediĉitan al la atombombaj viktimoj.

EN Tokio, ni ricevis leteron de iu studentino el Hiroŝima, per kiu ŝi informis nin, ke la malsanuloj de la "Hospitalo de Atommalsanoj" deziregas rigardi nian prezentadon, kiam ni vizitos la urbon. La skribinto petis nin en la nomo de "Papergrua Asocio"* viziti la hospitalon kaj fari prezentadon por konsoli la malsanulojn. La ĉina popolo ĉiam zorgas pri la suferantoj de Hiroŝima kaj la Pekina Akrobata Trupo volonte akceptis la inviton. Ricevinte nian respondon, la studentino tuj sciigis tion al la direktoro de la hospitalo kaj al la malsanuloj, kiujn ŝi konis. Post tio, ekvigladis babiloj pri la Pekina Akrobata Trupo ĉie en la malsanulejo.

Posttagmeze en la kvina de marto, la Pekina Akrobata Trupo el pli ol 30 personoj, vizitis la hospitalon alportante al la malsanuloj elkoran simpatian de la ĉina popolo.

La vicdirektoro de la hospitalo diris kun sincera peto, ke ankaŭ la pacientoj de grava malsano deziras rigardi nian prezentadon. Kaj ni venis al la fako de

gravmalsanuloj, kun dekoj da kopioj de nia programo. Ni esprimis al ili nian profundan kunsenton kaj komunikis al ili ke la ĉina popolo multe zorgas pri ili. Ili respondis dankeme kun nereten-eblaj larmoj: "Dankon! Ni scias ke la ĉina popolo vere tre zorgas pri ni." Iuj el ili diris nenion sed nur fikse rigardadis nin kun larmoj en la okuloj. Kiam ni disdonis al ili nian programon, ili ĝoje foliumis ĝin.

Kiam ni pasis tra la vestiblo, tie jam amasiĝis pli ol 300 malsanuloj. Ili varme nin salutis. La vicdirektoro informis nin, ke ĉeestis ankaŭ malsanuloj de la Hospitalo de Ruĝa Kruco. Kaj en tiu vestiblo ni komencis nian prezentadon.

La spektantoj atenteme rigardis nian prezentadon jen ridegante, jen plaŭdante. Ifoje ili ridegis ne povante sin rektigi, ke la infanoj de la Papergrua Asocio devis ilin admoni por esti ne tro emociitaj. Post la fino de la prezentado, ili ĉiuj ekstaris. En aplaŭdego, la geknaboj de

la Papergrua Asocio prezentis al ni ringon de mil grupoj. Kiam ni forlasis la hospitalon ili adiaŭis nin

Membroj de la Ĉina Akrobata Trupo alrigardas la "Mil Papergruojn" (per kiuj japanaj infanoj esprimas sian deziron al paco) ĉe la Pacturo en Hiroŝima



starante en vicoj kaj premante la manon de ĉiu el ni, kaj daŭre svingis siajn manojn al ni, kiam ni jam estis ekster la hospitalo.

En Hiroŝima ni loĝis en iu hotelo ĉe la Parko de Paco. Oni diris, ke pluraj mondkongresoj kontraŭ A. kaj H. bomboj okazis tie. La hotelo situas ĝuste kontraŭ la Memordomo de Atombomba Eksplozo, malantaŭ kiu troviĝas la Monumento de Mortigitoj de Atombomba Eksplozo. De la monumento oni povas vidi la domon kiu estas la ununura restaĵo post la eksplozo. En la parko estas cetere du vidindaj lokoj: la "Turo de Paco" (aŭ la Turo de Mil Gruoj) kaj la Tombo de Mortigitoj de Atombomba Eksplozo. La antaŭa estas establita de la tuta lando kaj la mondo pro la alvoko de hiroŝimaj lernantoj por memori la japanan knabinon Sasaki Teiko mortintan de atommalsano, kaj la lasta estas la tenejo de la cindroj de la 200,000 atombombaj viktimoj.

Ni povis vidi tra la fenestroj multajn vizitantojn, kiuj promenadis aŭ fotografis. Estis ankaŭ multaj personoj, kiuj meditis antaŭ la monumento.

Iun sunplenan antaŭtagmezon, promenante kun kelkaj japanaj amikoj en la parko antaŭ tiuj memorigaj objektoj, ni ekparolis pri la pasinteco kaj estanteco de Hiroŝima kaj ĉiuj multe emociiĝis kaj indigniĝis. Iu maljuna japana amiko diris: "Ekstere Hiroŝima estas kovrita per gazo de falsa paco, sed en la korprofundo de loĝantaro kuŝas semoj de malamo." Li fingromontris montosupron kaj daŭrigis: "Vidu, tie estas A. B. C. C. (usona organizaĵo speciale studi atomajn malsanojn)." Post paŭzeto li denove faris pugnon kun indigno: "Estas usonanoj, kiuj ĵetis la atoman bombon, kaj nun denove estas usonanoj, kiuj eltiras sangon de japanoj por studi. Ili prenas nin japanojn kiel kobajojn. Onidire, ili almenaŭ jam eltiris plasmon de la hiroŝima popolo kun valoro de pli ol 100,000,000 dolaroj (laŭ la prezo de sanga banko)."

Alia juna japana amiko diris, montrante per fingro en la direkto de la Hiroŝima-a Universitato: "Por aĉeti niajn korojn kaj kovri siajn krimojn la usonanoj per la mono akiritaj per superflujaj materialoj establis en la Universitato Instituton de Atoma Ĥemio kun suborganizo Hospitalo de Atommalsanoj, kies inaŭguron persone partoprenis la usona ambasadoro Edwin O. Reischauer kun lia edzino. La burĝa gazetaro kaj televido senhonte propagandis por ili, kvazaŭ Usono tiu diablo estus fariĝinta subite savanto de la mondo. Kun la helpo de la reakcia japana verkisto Tanabe Koiĉiro Usono establis 'Domon de Ripozo'. Ankoraŭ pli senhonte, ŝajnigante sin pacifistoj, ili klopodis superkontroli la Papergruan Asocion funkciigatan de gelernantoj . . ." Parolante pri la kazo de tiu asocio ĉiuj ankoraŭ pli indignis. Ekstaris la maljuna japana amiko de la herbejo kaj diris kun ekscitiĝo: "Ni devas malkaŝi kaj akuzi. Kaj

pligrave, ni devas senmaskigi la usonan agenton kaj la reviziistojn. Iu usonano, sub la surtuto de pacifisto, trompakiris al si la fidon de parto de japanoj kaj li nun direktas la reakciulojn en Hiroŝima donante instrukciojn kaj ordonojn por disspliti la Kongreson kontraŭ A. kaj H. Bomboj kaj organizi duan tian kongreson. Sub lia direktobastono la reviziistoj ludis senhontan rolon, dissemante inter la amaso la koncepton de falsa paco, kaj ŝminkante Usonon. . . ."

Kiam ni pasis preter la "Turo de Paco", grupo da knabinoj estis pendigantaj papergruojn propramane faritajn. Ni konversaciis kun ili. Trovinte ke ni estas anoj de la Pekina Akrobata Trupo, ili petis nin doni al ili niajn aŭtografiojn kaj fotografiĝi kune kun ili. Ili diris al ni, ke la malsanuloj de la Hospitalo de Atommalsanoj estis tre tuŝitaj de nia prezentado kaj diris, ke nia trupo venis konsoli ilin kun plena sincereco.

Poste, kiam ni preterpasis la ununuran post-restantan konstruaĵon, unu afiŝo apud ligna budo tiris nian atenton; ĉe nia alproksimiĝo, venis el la budo maljunulo. Sen enkonduko li varmkore alparolis nin pri la atoma eksplozo en Hiroŝima kaj ankaŭ pri si mem. "Mi nun estas solulo, sed antaŭ deksep jaroj, mia familio konsistis el sep personoj. . ." Li eksingultis. Ni rapide ŝanĝis la paroltemon, demandante lin pri la kaŭzo de surgluo de la afiŝo. Li respondis: "Multaj personoj parolas ĉiutage pri naciaj trezoroj, sed tio estas la vera nacia trezoro." Li fingromontris la difektitan konstruaĵon kaj daŭrigis: "jam dek sep

** Organizo establita por rememori japanan knabinon, kiu kuŝante en hospitalo pro atomeksplosa malsano, amuzis sin per farado de papergruoj, pensante ke ŝi resaniĝos, kiam ŝi estos farinta mil papergruojn. Sed ŝi mortis post faldaro de miloj da papergruoj.*

(Daŭrigo sur p. 38)

Ĉina akrobatisto prezentanta sian arton antaŭ la atommalsanuloj.



KI BAJŜI

*de Vang Mansuo,
membro de la Ĉina Belarta Instituto*


LA UNUA DE JANUARO, 1964, ESTAS LA CENT-JARA JUBILEO DE LA ĈINA PENTRISTO KI BAJŜI. NI SPECIALE APERIGAS LA SEKVANTAN ARTIKOLON POR LIN OMAĜI. ONI VIDU ANKAŬ LA ILUSTRAJN PAĜOJN, SUR KIUJ APERIS LIAJ PENTRAĴCJ.

— La Red.

Filo de la Laboranta Popolo

Ki Bajŝi estis elstara pentristo, belskribisto, sigelil-gravuristo kaj poeto de nuntempa Ĉinio. Li naskiĝis en 1863 en Hiangtan, Hunan-provinco, kaj mortis en 1957 en Pekino. Antaŭe li havis personan nomon Ĉunĝi, kiun li poste ŝanĝis en Huang. Lia voknomo estas Binŝeng, kaj Bajŝi estas lia alia nomo. Li devenis de iu malriĉa kamparana familio. Estante okjara, li sukcesis trovi eblecon senpage lerni ĉe privata instruejo de la avo de patrina flanko. Post unu jaro li devis interrompi la lernadon por helpi en laboroj hejme. Tamen li ne forgesis lerni. Eĉ kiam li paŝtis bovon sur montoj, li pendigis libron sur bovkorno. Li legis, kiam ajn li trovis iom da libertempo. Nokte li sin ekzercis en skribado kaj desegnado sub lamplumo. Kiam li atingis la aĝon de dekkvin jaroj, li montriĝis ne taŭga por agrikul-

KI BAJŜI



tura laboro pro sia korpa malforteco kaj iris metilerni ĉe lignajisto. Por pliperfektigi la metiarton de meblogravurado li ekstudis albumojn de antikvaj pentraĵoj. Li ankaŭ ellernis pentradon de floroj kaj birdoj, homoj en antikvaj kostumoj kaj portretoj. Dudeksepjara, li fariĝis ne nur lignajisto-gravuristo tre ŝatata de la loka popolo, sed ankaŭ konata pentrometiisto.

De Lignajisto-gravuristo al Pentristo

La arta talento de Ki Bajŝi altiris la atenton de la lokaj literaturistoj-pentristoj. Dum sia inter-

Floroj kaj Packolomboj—pentrita de Ki Bajŝi por celebri la inaŭguron de la Paca Konferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj.



rilatado kun ili, li havis ŝancojn lerni el la heredaĵoj de ĉinaj artoj. Pro tio li multe progresis en belskribado kaj pentrado. Kaj plie li ankaŭ lernis verki poemojn kaj gravuri sigelilojn. Ekde tiu tempo li ne plu vivtenis sin kiel lignajisto, sed ekskluzive per pentrado kaj sigelil-gravurado.

Invitite de amikoj, en la periodo de 1902 ĝis 1908 li vojaĝis kvin fojojn al aliaj urboj kaj dume vizitis multajn belajn lokojn. Li vizitis Ĉang-an, ĉefurbon en antikva tempo, kaj Pekinon, ĉefurbon de King-dinastio. Li estis en Gujlin, kie la montoj kaj akvoj estas la unuaj en la tuta lando, li surgrimpis pitoreskan monton Luŝan kaj admiris Hukju-monton faman pro ĝiaj fonto kaj ŝtonoj. En siaj vojaĝoj li vizitis ankaŭ multajn famajn lokojn kaj historiajn restaĵojn, veturis sur maro kaj transiris famkonatajn riveregojn kaj grandajn lagojn. Tio donis al li pli multe da ŝancoj por lerni de la naturo, konatiĝi kun multaj poetoj kaj pentristoj, aprezi famajn altvaloraĵajn artaĵojn kaj levis lian artan klerecon. Lia fama albumo de pejzaĝo-pentraĵoj titolita *Bildoj de Pruntprenitaj Montoj* estis rikolto de liaj plurfojaj vojaĝoj. Lia atingo en arto admirigis la tiamajn pentristajn rondojn. Iu ŝtata oficisto de King-dinastio, kiu konis lin, eĉ intencis rekomendi lin fariĝi "kortega pentristo", glora ofico por la tiamaj pentristoj. Sed li artisto neemanta flati kaj deveninta el laborula familio, ne volis fariĝi lakeo de la imperia familio kaj rifuzis la proponon. Reveninte de la vojaĝoj, li intencis restadi en sia naskiĝloko kaj trankvile okupiĝi en la arta kreado. Sed post la Revolucio de 1911 kaj la renverso de King-dinastio la militaristoj komencis bataladi unu kontraŭ alia por potenco, jaron post jaro. Tio malebligis al li trankvilan vivon en sia naskiĝloko. En 1917 li transloĝiĝis al Pekino.

Lia Origineco en Pentrarto

Kvankam Ki Bajŝi jam atingis bonegan sukceson en junaĝo per sia artkreado, tamen li ankoraŭ ne estis liberigita el la kadro de tradicia stilo de la ĉinaj antikvaj pentristoj. Kiam li fikse loĝis en Pekino, li decidis ŝanĝi sian stilon de pentrado. Lernante de antaŭuloj, li ne katenis sin per nur forma imitado. Li sintezis la bonajn kvalitojn de la popola arto kun sia propra kono pri la naturaj figuroj, kaj fine kreis sian propran stilon en pentrado, belskribado kaj sigelil-gravurado, post dek jaroj da diligenta studado, ekzercado kaj laborado.

La arta stilo de Ki Bajŝi plenumplekse maturiĝis en la periodo kiam li havis aĝon de sesdekkvin ĝis okdekkvin jaroj. Dum tiuj ĉi dudekkkelkaj jaroj li sukcese distingiĝis per pentrado de floroj, birdoj kaj insektoj. Precipe la bildoj de salikokoj, kraboj, ranoj kaj kokidoj, pentritaj de li estas tute diferencaj de tiuj pentritaj de antaŭuloj. En la pentrado de salikokoj

li neniam ripetis la strekojn kaj malpliigante iliajn piedojn, li aldonis al ili pliajn palpilojn, tiel ke iliaj karakterizaj trajtoj fariĝas pli elstaraj kaj ke ili vivece prezentigas sur la papero kaj forme kaj spirite. En la pentrado de krabo li sciis bone kapti ĝian flanken rampantan manieron kaj per kelkaj simplaj kaj rafinitaj strekoj li kapablis sentigi la dikecon de ĝiaj plataj piedoj kaj la kvaliton de ĝiaj du lanugaj pinĉiloj. Pentrante amindan junan kokidon similan al maso da densa lanugo aŭ vigle salteman ranon, li ankaŭ faris nur kelkajn strekojn, sed iliaj karakterizaĵoj estas plene donitaj en la bildo ĉu en formo ĉu en spirite. La insektoj, kiujn li pentris en la fruaj jaroj estis tre subtile kaj vivece faritaj, dum en lia maljuneco ili estis tre lakone pentritaj, sed spirite similaj. Iafaĵe li pentris insektojn per tre subtilaj strekoj sur fono de herboj kaj floroj faritaj per dikaj rapidaj spiritdonaj ektuĉoj, formante tre harmonian kaj vivplenan tuton. Tia pentra tekniko, kiun neniu antaŭulo iam provis, estas de li kreita.

En liaj pentraĵoj de floroj kaj birdoj ĝenerale la trunko, branĉoj, folioj kaj volviloj estas pentritaj per la ĉina



Pejzaĝo kun Pizango—pentrita de Ki Bajŝi.

(nigra) inko, dum la floroj, fruktoj kaj birdoj per koloroj, por pli bone reliefi la spiriton kaj trajtojn de la floroj kaj birdoj kaj elstarigi la ĉefajn motivojn. Pentraĵojn de pejzaĝoj kaj homfiguroj li pentris ne multe en sia maljuna aĝo. Iufoje tamen li prenis la popolan ludilon "la nefaligebla maljunulo" kiel motivon por moki la burokratojn en la malnova socio. Per la rimedo de intensa kontrasto inter nigro kaj blanko li bildigis la figuron de la malnovaj burokratoj, kiuj aspektas imponaj ekstere sed fakte plej abomenindaj. La malŝato, kiun li portis kontraŭ tiaj malnovaj burokratoj, bone speguliĝas en la satira poemo, kiun li skribis sur la pentraĵo:

Gravmiene vi imponas kiel altrangulo.

Falis vi neniam danke al terbullo.

Vin frakasas mi per subita ekbato

Sed ne trovas ĉe vi koron, nek hepaton!

Ki Bajŝi ne nur malfermis novan vojon en la kreado, sed ankaŭ havis sian apartan vidpunkton en la teorioj de la pentroarto. Krom lernado de la atingoj de la antaŭuloj, sen laŭforma imitado, li insistis ankaŭ pri diligenta pentrado de la naturo sen naturalisma kopiado. En liaj propraj vortoj: "Oni devas pentri la objekton laŭ la naturo kaj samtempe laŭ sia propra kono; kaj oni devas pentri laŭ sia propra kono sed samtempe laŭ la naturo. Nur tiam prezentiĝos kaj la formo kaj la spirito. Tio ne estas atingebla hazarde." Jen estas lia nova klarigo donita al la tradicia metodo de la ĉina pentroarto: "Objektive lerni de la naturo kaj subjektive deveni de la interna fonto." Ĝi estas ankaŭ resumo de la sperto akirita en lia artista praktikado dum multaj jaroj.

La pentrado, belskribado kaj sigelil-gravurado de Ki Bajŝi havas siajn proprajn karakterizaĵojn, samtempe ankaŭ komunan stilon, sekve la surskriboj kaj sigeloj sur liaj pentraĵoj estas tre harmoniaj por sia verko kaj nemalhaveblaj. Iufoje la versaĵo surskribita ankaŭ fariĝas neapartigebla organisma parto de la pentraĵo. La kombinita uzo de tiuj ĉi kvar artoj estas unu el la karakterizaĵoj de la ĉina pentroarto. Kaj tion Ki Bajŝi heredis.

Digno kaj Honoro de la Popola Artisto

Ki Bajŝi estis ne nur eminenta artisto, sed ankaŭ brava maljuna patrioto kun fortika spino, kiu varme amis sian patrion kaj malamegis la malamikojn. Kiam la japanaj imperiistoj invadis Ĉinion, la malamikoj okupantaj Pekinon penis delogi lin per festenoj kaj donacoj por akiri liajn verkojn, sed li ne estis moliĝita. Kvankam li sin vivtenis per vendado de siaj pentraĵoj, li tamen decideme ĉesigis tion por rifuzi la malamikojn. Kiam liaj parencoj kaj amikoj maltrankviliĝis kaj skribis al li por demandi pri lia vivo, li respondis per poemo, en kiu du versoj tekstis jene:

Hontas mi naciperfidi kiel maljuna vivanto,

Sed ne ĝenas min fariĝi en urbego malsatanto.

Tio signifas, ke li preferis malsati ol submetiĝi antaŭ la malamikoj. Aŭdinte en 1945 ke la japanaj rabistoj kapitulacis, li skribis alian poemon por elskribi sian ĝojan ekscitiĝon en celebrado de la liberiĝo de sia nacio. Post kiam la subtenata de usona imperiismo reakcia registaro de Ĉiang Kajŝek estis renversita kaj la Ĉina Popola Respubliko estis fondita en 1949. Ki Bajŝi ricevis profundan prizorgon de la partio kaj la registaro. Li fariĝis honora profesoro de la Centra Instituto de Belartoj kaj estis elektita kiel membro de la Prezidentaro de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Belartaj Rondo.

En 1953 la Ministerio de Kulturo honoris lin per titolo de Popola Artisto kaj la Ligo de Ĉinaj Artistoj elektis lin prezidanto. En 1954 li estis elektita reprezentanto al la Tutlanda Popola Kongreso. Grandkvante eldoniĝis liaj verkoj, kiuj estis bonvenigataj de la vasta popolamaso kaj akiris internacian renomon. Persone spertinte la diferencon inter la nova kaj malnova socioj, Ki Bajŝi sentis sin kvazaŭ rejuniĝinta. Denove kreskis lia kreemo. En la plej lastaj jaroj de sia vivo li plie verkis kelkcent novajn pentraĵojn. Lia nomo kaj liaj multaj eminentaj artverkoj, kiujn li postlasis, restos por ĉiam senmortaj kiel la "ĉiama verdaĵo"* kiun li pentris en sia naŭdekkvina jaro.

* *Rhodea japonica*, rigardata de la ĉinoj kiel simbolo de eterna juneco.

(Daŭrigo de p. 15)

30 JAROJ SUR TONGTIAN-RIVERO

emocion. Li neniam imagis al si ke en sia vivo li povos vidi propraokule la porĉiaman finon de la mizera vivo sur Tongtian-rivero.

La 1-a de julio de 1963 fariĝis neforgesebla tago por maljunulo Tando. En la tondra tamburado kaj tamtamado, Tando kaj liaj kamaradoj gaje surpaŝis la ponton. Li staris sur la larĝa ponto kaj rigardis al la torentanta fluo, kiu galopas orienten kun ŝaŭmantaj ondoj kvazaŭ miloj da senbridaj ĉevaloj. Ankaŭ lia koro kaj sango komencis ondadi kaj boladi kiel la torento. Kaj reaperis en lia imago la figuroj de la mortintaj intimaj kamaradoj. Li eksvingis per la mano kaj grandpaŝe transiris la ponton kun kapo alte levita.

La longaj vicoj de bele ornamitaj kamionoj lin preterveturis sur la ponto. En la ĝoja aplaŭdo kaj aklamo Tando apenaŭ povis reteni siajn varmajn larmojn kaj emocie diris al siaj kamaradoj: "Ĝi estas la beno al ni tibeta popolo fare de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ!"

PENTRAĴOJ

de

KI BAJŜI

盜竊
盜者為盜難逃
不肖之民脂膏
白晷




Prefere esti vinŝtelanto ol oficisto koruptebla

Pejzaĝo (parto)



五亭
老萍




Kvin kokidoj


irino en antikva kostumo

萬丈塵沙日色薄
玉璽停車雪玉作慈母
窗鏡
身上衣未到長安
不堪苦
齊瑄





夕白七印
 翁
 廣
 橫
 心
 間
 亂
 時
 揮



Salikokoj




寄萍堂上老人
 畫於舊京
 借山館中
 時癸亥冬十二月
 火



Kraboj

Kato kaj rato



徐悲鴻

Birdo kaj Lotusfloro



徐悲鴻
京華
二年
月
八

Krizantemoj

徐悲鴻
京華
二年
月
八

NIA NOVA BUROESTRO

LANG DEHUANG

ELIRINTE el la oficĉambro de la buroestro, mi ja sentis iom da ĝeneco. Kaj en mia cerbo ŝvebadis la demando: Kiel mi devos daŭrigi la laboron poste?

Preskaŭ du monatoj jam pasis de kiam la nova buroestro alvenis. Krom la intervido kun li en la unua tago kiam li komencis labori en nia buroo, mi havis ankoraŭ neniun rektan kontakton kun li. Tamen jam ne malmulte da “novajoj” mi aŭdis pri li.

La unua “novajo” venis de la dokumentisto eta Hju. En la kvina tago post sia alveno, la nova buroestro donis al eta Hju ŝlosilon, dirante: “La dokumentojn, kiujn mi devas legi, vi enŝlosu en tiun ĉi tirkeston, kies du ŝlosilojn ni tenu po unu. La legitajn dokumentojn mi remetos en ĝin, kaj vi povos depreni ilin ĉiumatene. Miajn opiniojn mi skribos sur la dokumentoj.” Post tio, escepte de ĉeesto en la ĉiumerkreda lernado kaj la buroa kunveno okazanta dufoje en ĉiu monato, nia nova buroestro tuttage rondiradis kaj ĉirkaŭrigardadis de unu konstruejo al alia. Oni diris ke li pli similas al laborbrigadestro ol buroestro. Diru, ĉu tia labormaniero de buroestro ne estas “novajo”?

Apenaŭ pasis la unua “novajo”, tuj sekvis aliaj el la Sekcio por Ĝeneralaj Aferoj.

La haroj de la nova buroestro jam griziĝis. Dum la manĝohoroj ĉiuj ŝatas sidiĝi ĉe li kaj interbabili kun li tute senĝene. Sed laŭ eta Li, laboranto de la dirita Sekcio, li estas ankaŭ tre severa! Kiam li kritikis iun, li tion faras ne multe per la buŝo, sed per siaj kondutoj konsciigante al vi ke vi eraris. Oni diris, kiam li unuafoje manĝis en la komuna manĝejo, li metis maljunan Caj, la administranton de la manĝejo, en embarason: antaŭ la publiko li reportis al la kuirejo la manĝaĵon, kiun oni preparis speciale por li, laŭ ordono de maljuna Caj. Kvankam li diris nenion, tamen maljuna Caj sentis sian vangon brule varma kaj poste li ne plu kuraĝis prepari por li plian manĝaĵon.

Vidante ke en lia hejmo estas tre malmulte da mebloj, la estro de la Sekcio por Ĝeneralaj Aferoj sendigis unu tablon al lia hejmo. Sed la buroestro kunvokis siajn infanojn kaj kune kun ili portis la tablon en la komunan loĝejon de laboristoj. La sekvantan tagon, li diris al la sekcia estro: “La tablon

mi jam portis al la komuna loĝejo, ĉar tie mankas tablo kaj estas maloportune por lernado kaj legado de la laboristoj, do pruntu ĝin al ili. En mia hejmo jam estas unu, do iel ĝi sufiĉas.”

Ĉar antaŭe mi aŭdis tiel multe da “novajoj”, tial kiam hieraŭ li deprenis de mi amason da leteroj de popolamaso, kiujn mi jam ekzamenis kaj pasigis post responda aranĝo, kaj invitis min hodiaŭ viziti lin por iom babili, mi tre maltrankviliĝis timante ke la nova estro faros ian “novajon” ankaŭ kun mi.

Hodiaŭ matene, nia interparolo iris ne malglate ĉe la komenco. Li petis ke ĉiusemajne mi prezentu al li almenaŭ kelke da gravaj leteroj de popolamaso, dirante ke tio estas “bona nutraĵo”, kion oni devas manĝi ofte. Kaj li aldonis: “Mi petas vian helpon, ke vi ofte sciigu min pri la opinioj kaj postuloj de popolamaso. Alie, se mi fariĝus burokrato kiu sidas alte kaj nenion scias pri la sube okazintaj aferoj, ankaŭ vi meritus punon.” Tiuj vortoj tiel ĝojigis min ke mi ekridis brue kaj ankaŭ li mem laŭte hahais. Tio estas facila afero kaj mi volonte konsentis. Tamen li asignis al mi malfacilan taskon finante sian parolon. Jen kion li diris!

“Eta Sun, mi konsilas, ke vi ne ‘ludu futbalon’ ekde nun, kiam vi faros respondajn aranĝojn pri leteroj de popolamaso, ĉar tio ne povas solvi problemon. Ludu korbopilkon, ĉu bone?” Rimarkante mian konfuziĝon li klarigis: “Mi volas diri ke traktante leterojn de popolamaso, vi devas agi kiel en la ludo de korbopilko. Kiam oni ĵetis la pilkon al vi, vi devas ĝin akcepti, firme teni kaj klopodi ĵeti ĝin en la korbon, t.e. definitive solvi la problemon. Ni devas multe solvi kaj malmulte transdoni, ĉu tio estas ebla, laŭ via opinio, malmulte ‘ludi futbalon’?”

“Teni” sed ne “transpiedbati” la pilkon! estas facile por paroli sed malfacile por praktiki! La nova buroestro ne komprenas, ke nia buroo estas ĉi tie pli malpli granda urba organizo. La kompanioj gvidataj de nia buroo nombriĝas je dek kelkaj, kaj la leteroj kaj alvizitoj de popolamaso, ĉiumonate, nombras almenaŭ kelkdekojn. Se ĉiujn problemojn ni firme “tenus” ĉu ni povus glate daŭrigi la “ludon”?

Sed, ĉar la buroestro jam donis tian instrukcion, vole nevole mi devis konsenti almenaŭ buŝe, tamen en mia koro mi povis neniel adaptiĝi al la nova “ludo” kvazaŭ tramo deviinta de miaj malnovaj

rutinaj reloj: unue transdoni, due preteksti kaj trie konservi por referenco en laborado super la petlete-roj. Kiam mi eliris el la ĉambro de la buroestro, en mia cerbo ŝvebis la granda demando: "Kiel mi devos labori poste?"

Kia hazardo! Antaŭtagmeze mi interparolis kun la nova buroestro, posttagmeze de la sama tago la pedelo jam donis al mi du leterojn.

Malfermite ilin mi trovis ke ambaŭ venis de loĝantoj ĉe Ajmin-strato. Oni skribis, ke tie ĉe ili la muraj kamentuboj estas ŝtopitaj. Jam en la pasinta jaro la hejtado fariĝis malfacila kaj ili petis ke la kompanio sendu iun por ĝin ripari, sed la kompanio ne konsentis, do ili sin turnis al la supera organizo.

"Aj, ili petas nin eĉ por tia bagatelo!" mi sentas tion kaj indigninda kaj ridinda. "Ĉu matura homo, scipovanta skribi leteron, ne scipovas malŝtopi kamentubon? Ili jam petis helpon de la kompanio, kaj tiu ĉi ne konsentis, ĝi certe havis sian motivon." Ĉe tio mi elprenis paperon kaj ekskribis respondan leteron. Kiam mi skribas la vortojn: "Estas malfacile por ni tion fari, do vi mem ĝin solvu", subite mi rememoris kion la buroestro diris antaŭtagmeze kaj mi ekhezitis. Post cerbumado, mi ŝanĝis la ideon kaj decidis peti la kompanion refoje konsideri la aferon kaj mi tuj skribis leteron al ĝi.

La letero estis tuj finota, sed mi ree ĝin disŝiris. Ankaŭ tion fari mi ne devis! La nova buroestro ĵus diris ke ni devas multe solvi sed malmulte transŝovi, kiel do mi povus tuj transdoni du leterojn! Kaj cetere, la loĝantoj jam petis al la kompanio, kaj sin turnis al la buroo nur post ĝia malkonsento. Post konsidero mi decidis profundigi en la praktikon: mem iri al la kompanio por interkonsiliĝo.

Post kiam mi diris la aferon al k-do Li, direktoro de la kompanio, li prezentis al mi la aktualan situacion: estas multaj taskoj sed malmultaj plenumantoj. Kaj malŝtopi kamentubon ja ne estas tiel malfacile kiel konstrui domon. Havigu al si brikon, ĝin ligu per ŝnuro, grimpu sur la tegmenton, kaj la kamentubo estos facile malŝtopebla per kelke da frapoj.

Prave li diris! Mi tute konsentis kun li. Reveninte al la buroo, mi skribis responde ke "estas neeble doni helpon", sed por esprimi zorgemon, mi rekomendis en la letero al ili la metodon de malŝtopo de kamentubo rekomenditan de direktoro Li. Kaj poste mi prezentis la leteron al la buroestro por peti lian opinion.

Sed, neatendite, post lego de mia letero la buroestro min mutigis per unu demando:

"K-do eta Sun, estas necese por vi konsiliĝi kun direktoro Li. Sed ĉar li persistis en sia malnova opinio, ĉu vi iris konsiliĝi kun tieaj laboristoj?"

LIANG SANGKJUAN:

Nova Kanto sur Je-monto

*El freŝa teo verda kaj dolĉa akvo klara
Trinkaĵon faris mi por la limgardanto kara:
Irante la postenon ripozu por momento,
Ho, kara, prenu teon — esprimon de korsento.*

*La sur te-mont' postenon algrimpas la ŝtonpado,
La ŝtonoj sur ĝi brilas pro via paŝfrotado.
Jam kiom da nokthoroj ventpluvaj vi forsendis,
Kaj kiom da tagiĝoj orbrilaj ĝisatendis!*

*Irante te-rikolti en ĉiu la mateno,
Okule mi salutas vin sur la montposteno.
Vespere je hejmiro, portante l' te-korbeton,
Mi nepre vin rigardas, la bravan silueton.*

*Al mi mem en silento mi pensas kaj demandas:
Ĉu ĉe l' hejmloko via tearbojn vi ne plantas?
En viaj te-arbaroj knabinoj te-rikoltas?
Ĉu amon al neniu el ili vi nun portas?*

*Sonore mi kantadas, mallaŭte mi demandas:
Ĉu ŝatas vi l' arion, ti-kiun mi nun kantas?
Ĉu vian te-arion similas kanto mia?
Ĉu ne similas mi al la amatino via?*

*El freŝa teo verda kaj dolĉa akvo klara
Trinkaĵon faris mi por la limgardanto kara:
Irante la postenon ripozu por momento,
Ho, kara, prenu teon — esprimon de korsento.*

TRAD. LAŬLUM

"Ne mi ne iris," la demando venis subite kaj mi estis tute senprepara.

"Do, ĉu vi iris al la hejmo de la du skribintoj por rigardi kian realan malfacilon ili havas?"

"An ankaŭ ne."

"K-do eta Sun," diris ridetante la buroestro, "por profundigi en praktikon, oni devas plonĝi ĝisfunde. Flosante surakve kiel lemno, oni ja ne povas 'profundiĝi', ĉu ne?"

Mi ekruĝiĝis kvazaŭ plenbuŝe maĉis ruĝan kapsikon. Ekpreninte la leterojn de sur la tablo, mi volis tuj foriri.

La buroestro ekkaptis min: "Kien vi iras?"

"Al Ajmin-strato."

"Ni iru kune!" surmetinte ĉapon, la buroestro jam estis preta iri kun mi.

“Buroestro, ĉu por tia bagatelo necesas ke vi iru?” mi baris al li la vojon.

La buroestro kutime malsuprentiris sian manikon kaj diris al si mem: “Laŭ mia memoro, la domoj ĉe Ajmin-strato ĉiuj estas kun fera tegmento tre alta kaj kruta. Tio, kion la du leteroj diras, eble estas komuna problemo. Mi devas iri kaj rigardi persone.” Li ridis al mi dirante: “Vi intencas fari min burokrato? Sed mi ne konsentas,” kaj min puŝante li eliris.

La fakto estas vere sama kiel supozita de la buroestro: la domoj de Ajmin-strato ĉiuj estas kun fera tegmento tre alta kaj kruta. Tie troviĝas nek balkono nek io per kio oni povas grimpi supren al la tegmento. Eĉ grimpite sur ĝin, homo ne posedanta sperton de altgrimpo certe sentas kapturiniĝon kaj malfortiĝon de la kruroj kaj li povas nur kuŝi tie surventre sed ne fari eĉ unu paŝon, por ne paroli pri malŝtopo de la kamentuboj. Kaj krome por surgrimpi la tegmenton oni devas havi eskalon, por malŝtopi kamentubon oni bezonas specialan longan ŝnuron. Ĉion ĉi la loĝantoj ja ne havas. Sen iloj kaj sperto ja estas malfacilege por ili, “mem solvi” la problemon laŭ nia insisto.

Ni faris kelkajn rondirojn ĉirkaŭ la tieaj domoj kaj trovis post kalkulo ke pli ol dudek fenestroj eligas fumon kaj bone funkcias nur du aŭ tri kamentuboj.

La buroestro decidis fari endoman viziton al la du letterskribintoj, ĝuste tiam ili hejtis la fornon kaj en la ĉambro estis tiom da fumo ke ni troviĝis kvazaŭ en granda vaporumilo. Mi pensis en mi: Nu, la afero estas jam tre klara, ni devas rapide reiri por decidi kiel solvi la problemon; por kio do ni ankoraŭ eniru ĝui la fumadon? Mi ektiris la baskon de la buroestro intencante peti lin reiri. Sed li jam grandpaŝe eniris la ĉambron, kaj laŭte tusante li ankoraŭ sin puŝis al la kameno. Post longa observado al la kameno, li elpoŝigis pecojn da uzita papero kaj ilin ekbruligis ĉe la aperturo de la kamentubo.

Rigardante la flamon forte blovatan en la ĉambron, la buroestro certigis: “Nu, difektiĝis, difektiĝis la kamentubo, verŝajne falis en ĝin brikoj, kiuj ĝin firme ŝtopis!”

Li stariĝis, plurfoje klarigis al la loĝantoj, faris promeson ke oni riparos ĝin kiel eble plej rapide, kaj ilin adiaŭis nur post tio.

Tiu vizito donis al mi solidan lecionon. Mi tutkore deziris korekti mian eraron ke mi, anstataŭ solvi, intencis forpuŝi la problemon, tial irinte el la domo, mi tuj surrajdis la biciklon kaj rapidis al la kompanio intencante fari kritikon al direktoro Li ke li tuj aranĝu la aferon.

Elirinte el Ajmin-strato, apenaŭ kiam mi turnis min norden, aŭdiĝis post mi la voĉo de la buroestro.

“Eta Sun, eta Sun! Momenton, momenton! Vi erare vin direktas!”

Erare? Descendinte de la biciklo mi ĉirkaŭrigardis: Mi ja estas en la ĝusta direkto! Do mi respondis: “Ne!”

La buroestro venis al mi kelkajn paŝojn kun sia biciklo kaj demandis min kun rido: “Kien vi iras?”

“Kien? Al la kompanio por viziti direktoron Li. Diru kien do?”

“Ho, ĉu vi intencas doni ordonon al direktoro Li? Tio ne konvenas! Ni direktu nin suden!”

“Suden?” Supozante ke la buroestro ankoraŭ volas fari viziton al aliaj loĝantoj, mi demandis kun miro: “Al kiu domo?”

“Al neniuj, sed al la konstruejo ĉe la Ĝardenstrato.”

Tiam la suno jam sin kaŝis post la pluretaĝaj domoj, almenaŭ jam pasis la kvara pm., por kio do ankoraŭ iri al la konstruejo tiel malfrue? Mi ne sciis kion la buroestro volas. Sed vidante ke li ne volas tuj veturi al la kompanio, vole nevole mi devis returni mian biciklon kaj lin sekvi.

Kiam ni alvenis al la konstruejo ĉe la Ĝardenstrato, la laboristoj estis laborantaj sur la tegmentoj.



La buroestro surgrimis eskalon por transdoni al ili morteron, sed ili diris al li neniun dankan vorton kvazaŭ li estus nur helplaboristo. Do ankaŭ mi ek-laboris sekvante lian ekzemplon. Laborante la buro-estro ekbabilis kun la laboristoj pri tiu afero.

“Majstro Jang, vi jam estas preskaŭ 50-jara, eble estas ne tre facile por vi labori sur tegmento, ĉu?”

“Aj—” ekridis majstro Jang, “Tiun ĉi metion mi praktikis jam 30 jarojn. Iri sur tegmento estas por mi kvazaŭ promeni surstrate. Kial ne facile? Kaj, dank’ al zorgo de la gvidantoj, oni eĉ ne sendis min labori sur tiaj tegmentoj kiajn la domoj de Ajmin-strato havas.”

“Pli bone ke vi gardu vin!” diris la buroestro. “Majstro Jang, ĉu ankoraŭ estas laboroj ĉe Ajmin-strato?”

“Ho jes, ankoraŭ kelkaj domoj bezonas riparon. Ĉi-posttagmeze tien devas iri laboristoj de la dua brigado!”

Aŭdinte tion, mi ekĝojis pri la ebleco!

“Majstro Jang, mi aŭdis de la loĝantoj de Ajmin-strato ke dum longa tempo iliaj kamentuboj estas ne purigitaj, nun iuj estas ŝtopitaj kaj eble en iujn eĉ falis brikoj, ke la fornoj fariĝis malfacile hejteblaj. Estas neeble por la loĝantoj mem ilin ripari surtegmente havante nek sperton nek ilojn. Diru, ĉu estas eble ke ni iru malŝtopi la kamentubojn por ili?”

La buroestro demandis al majstro Jang, kvazaŭ petante lian konsilon.

“Tute eble! Estas nenia malfacilo. Se la mal-ŝtopendaj kamentuboj estas malmultaj, ni povos ilin malŝtopi kiam ni faros tie riparadon. Kiel oni povos allasi ke la loĝantoj mem grimpu sur la tegmenton?”

“Kaj se ni farus ĝeneralan purigon al la kamentuboj? Ĉu tio malhelpus plenumi nian laborplanon?”

“Tio ankaŭ ne gravas! Por pliprodukto kaj ŝparo, ja ĉiuj ni estas tiom energiaj. Ĉu fari tian bagatelajon ni ne povus? Du tagoj sufiĉas por tio se la brigadoj sendos po unu homon. Dume la ceteraj laboru nur iom pli intense kaj niaj laboroj certe plenumiĝos laŭplane,” respondis majstro Jang senhezite, viŝinte sian ŝviton per la tuko, kiun li malligis de la zono.

Aŭdinte tiujn parolojn, iu junulo sur apuda tegmento ankaŭ alparolis laŭte la buroestron: “Tiun bagatelon volonte plenumos nia junula brigado en solo!”

“Brave! Junulo energiplena!” tiel dirante al la junulo, la buroestro sin turnis al mi kaj diris ridante: “Eta Sun, majstro Jang jam donis al ni konsilon.



Ilustritaj de Liu Jongkaj

Morgaŭ vi iru interkonsiliĝi kun direktoro Li, kaj la problemo, mi pensas, jam povos esti solvita.”

Kiam majstro Jang kaj aliaj finis sian labortagon kaj mi helpis ilin kune kun la buroestro ordigi la instrumentojn, estis jam la tempo por eklumigo de la lampoj. Sur la revena vojo al nia buro, mi biciklis malrapide kun klinita kapo kaj diris nenion. Sed en la koro mi remaĉis ĉiujn okazaĵojn en tiu tago.

Verŝajne tute komprenante mian penson, la buroestro faris al mi tri demandojn kvazaŭ en ekzameno:

“Diru, eta Sun, ĉu la peto en la du leteroj estas prava?”

“Jes,” mi balancis la kapon.

“Ĉu ni nun havas la eblon helpi ilin solvi la malfacilon?”

“Jes,” mi ree balancis la kapon.

“Diru, ĉu estas pli bone ‘teni’ la pilkon aŭ ‘ĝin transpiedbati’?”

“Kompreneble pli bone estas ‘teni’ la pilkon,” mi ridis, sed ja honton mi sentis en la koro.

La sekvan matenon, kiam mi venis en la buroon, mi trovis sur mia tablo bonorde kuŝantan libron kun aldonita polvokovrilo, la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. Inter ĝiaj folioj troviĝis slipo. Malferminte ĝin, mi legis la jenon sur la slipo:

(Daŭrigo sur p. 5)

ĈEN JUPI:

CAŬ HJUEKIN — GRANDA VERKISTO DE ĈINIO

Caŭ Hjuekin pasigis siajn infanaĝon kaj junecon en la feŭda burokrata familio kaj travivis luksan vivon de nobeloj. Post la konfisko, lia familio ruiniĝis. Iam li fariĝis instruisto en lernejo de imperiestraj parencoj sed ne povis longe daŭrigi la laboron. Fine li transloĝiĝis en vilaĝon okcidente de Pekino kaj vivis des pli mizere, ke la tuta familio povis manĝi nur kaĉon kaj li devis pagi brandon per mono gajnita per vendo de siaj memfaritaj pentraĵoj.

La granda ŝanĝiĝo de lia vivo igis lin koni pli klare la malbelon kaj mallumon de la feŭda socio kaj ĝia reganta klaso, kaj rememorigis lin dolore kaj profunde pri la vivo trapasita. Dum dek jaroj li laboradis pri tiu granda verko *Sonĝo de Buduaro*. Ne fininte ĝin li mortis pro mizero kaj malsano kaj manko de kuracista helpo. De lia manuskripto konserviĝas nur okdek ĉapitroj kaj la postaj ĉapitroj jam perdiĝis. En la tempo kiam li vivis, la romano en manuskripto estis jam cirkulata kaj legata inter liaj parencoj kaj amikoj, kaj oni eĉ faris komentojn por ĉiu ĉapitro de la verko. Post la morto de la verkinto la romano disvastiĝis en formo de mankopio. En 1791 kaj 1792, Ĉeng Vejjuan, aldoninte al ĝi la daŭrigan parton de kvardek ĉapitroj verkitan de Gaŭ E, presigis ĝin dufoje per moveblaj ideografiaj kaj dank' al tio ĝi fariĝis pli vaste konata.

*Kun malamo kaj malĝojo Caŭ Hjuekin komencas verkadon.
Pentrita de He Joŭĝi, Liu Danzej, Lin Kaj*

CAŬ Hjuekin, alinome Caŭ Ĝan, estis granda romanisto de Ĉinio en la dekoka jarcento kaj aŭtoro de la impona klasika romano *Sonĝo de Buduaro*.


En la ĉina feŭda socio, la romanistoj okupis tre malaltan socipozicion, pro kio, restas ĉe ni tre malmulte da materialo koncerne lian vivon. Oni diras ke li naskiĝis ĉirkaŭ 1715 p.K., mortis la 12-an de februaro, 1763, do vivis malpli ol kvindek jarojn. En 1963 estis la ducenta datreveno de lia morto.

Liaj prapatroj estis han-nacianoj, aliĝintaj al manĉu-nacio. De lia praavo ĝis lia patro, ĉiuj liaj antaŭuloj havis gravajn oficojn de la imperiestra familio de Kingdinastio, kaj ĝuis konfidon de la regantoj. Lia avo Caŭ Jin kiu ŝatis literaturon, amikiĝis kun multaj literaturistoj, scipovis verki poemon kaj teatraĵon, kaj estis posedanto de riĉa biblioteko, estis siatempe fame konata. Lia patro Caŭ Fu estis eksigita de la imperiestro en 1727 kaj ties tuta posedaĵo estis konfiskita pro ŝuldoj kaj aliaj kaŭzoj.

Vivo infanaĝa de Caŭ Hjuekin.

Pentrita de He Joŭĝi, Liu Danzej, Lin Kaj





La posedaĵoj de lia familio estas konfiskataj.

Penritra de He Joŭĵi, Liu Danzej, Lin Kaj

Caŭ Hjuekin estis homo malhumiliĝema kaj spite-
ma al la etiketoj. Li estis plena de ĉagreno kaj
intensa malkontento pri la maljustaĵoj de la feŭda
socio. Li kontraŭis al la Bagu*-stilo, kaj malestimis
la tiaman ekzamenan sistemon por civilaj oficistoj.
Li ankaŭ staris kontraŭ la patriarka absolutismo en
la feŭda familio, la katenoj al libera disvoiviĝo de la
personeco de la gefiloj, kaj la arbitra decido de ilia
sorto. Li havis siatempe tre progreseman koncepton
pri la virinoj, kaj kontraŭis al la ideo ke la viroj
superas la virinojn, opiniante ke la virinoj estas tiel

saĝaj kaj inteligentaj kiel la viroj, sed po-
vante trovi neniun elirejon al luma estonto
en la feŭda socio ili devis vivi humile.

Caŭ Hjuekin ankaŭ majstris en poezio
kaj pentrado. Bedaŭrinde lia poemaro ne
konserviĝas nun. Li tre ŝatis pentri ŝtonojn
por simboligi sian "malhumiliĝemon" kaj
esprimi sian plenkoran ĉagrenon per tiaj
ŝtonoj rekte starantaj. Li emis babili kaj
drinki, kaj ebriiĝinte li kutimis kanti flame
kaj melankolie.

En la ĉina socio tiutempa oni ne agnos-
kis romanon kiel branĉon de la ortodoksa
literaturo. La verkistoj de romanoj estis ofte males-
timataj de la "ortodoksaj literaturistoj". En granda
mizero Caŭ Hjuekin devis longe laboregi por krei la
grandan verkon *Sonĝo de Buduaro*, kio postulis
grandajn kuraĝon, energion kaj persistecon. Tion
ĝuste diris la versoj sur la fronta paĝo de tiu verko:

Ĉiu vorto estas ja sangguto;
Pen' ja ne ordinara jardeka.

* Rigida formo de eseoj speciale uzata en la ŝtata
ekzameno ekde Ming-dinastio.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

LANDLIMA TRAKTATO INTER ĈINIO KAJ AFGANIO SUBSKRIBITA

Je la 22-a de novembro, 1963
estis subskribita la Landlima
Traktato inter la Ĉina Popola
Respubliko kaj la Reĝlando
Afganio. Ĝi estas valida tuj post
la subskribo. Jen estas la kvara
el la landlimaj traktatoj, kiujn
Ĉinio kontraktis kun siaj najbaraj
landoj.

"REKUNIGI MANON FORTRANĈITAN"

Pri la sukceso de ĉinaj kuracis-
toj en la rekunigo de fortranĉita
mano ni jam informis lastjare. Tiun
ĉi mirindan sukceson ĥirurgian
oni povos vidi baldaŭ en la nove
farita multkolora scienca filmo.
Ĝi estas farata de la Ŝanhaja
Filmfarejo. Kaj ĉiuj kuracistoj,
kiuj partoprenis operacion estas
invititaj roli en la filmo.

ĜOJO DE ANTAŬAJ KULIOJ

La mizero de ĉinaj kulioj estis
konata. Mizeraj estis ankaŭ la
doklaboristoj en Ĉongking, granda
haveno ĉe la supra parto de
Jangzi-rivero. Pli ol 90% el ili
ne scipovis skribi sian propran
nomon antaŭ la Liberiĝo. Sed en
lasta oktobro tie en 67 familioj de
la antaŭaj doklaboristoj okazis
ĝojega festo por gratuli la enirojn
de iliaj gefiloj en altajn lernejojn.

KRESKO DE ŜPARMONO EN LA BANKOJ

Laŭ informo de la Ĉina Popola
Banko, la banka ŝparaĵo en la
tuta lando kreskis en la tria
sezono de 1963 130,000,000 juanojn,
plimulte ol en la dua sezono. Tiu
kresko superis tiun en la antaŭaj
sezonoj, kaj tia fenomeno estas
ĝenerala en ĉiuj provincoj, urboj
kaj aŭtonomaj regionoj.

LIGNA PLUGILO MALAPERIS EN TIBETO

Ligna plugilo estis ĝenerale
uzata en Tibeto por multaj jar-
centoj, kvankam la ferfandado
estis jam enkondukita en Tibeton
en la sepa jarcento. Ĉar la ser-
vutula sistemo malhelpis la pro-
greson de la produkta tekniko.
Sed nun tia primitiva plugilo jam
tute malaperis tie. La registaro
vaste provizis ferajn agrikulturajn
instrumentojn al tibetaj kampar-
anoj. Tial la agrikultura produkto
kvar- aŭ kvin-oble kreskis ol
antaŭ la Liberiĝo.

PLI DA LIBROJ VENDITAJ EN LA KAMPAROJ

Laŭ enketo de la Hinhua-
Librejo en 1963, 70% pli da libroj
estis venditaj en la kamparoj en
la unuaj tri sezonoj de 1963, ol en

La *Sonĝo de Buduaro* ĉefe temas pri la amtragedio de Gia Baŭju kaj Lin Dajju. Per priskribo de la historio de malprosperiĝanta aristokrat-burokrata familio la aŭtoro profunde malkaŝis la putriĝintecon kaj malbelon de la ĉina feŭda socio kaj ĝia regantaro, kaj larĝe kritikis diversajn malraciajn sistemojn de ĝi, ekzemple la ekzamenan sistemon por civilaj oficistoj, la sistemon de geedziĝo, la sistemon de sklavigo de servistinoj ktp., kiuj montris ke la feŭda socio liatempa proksimiĝis jam al disfalo kaj nepra pereco. La verkisto laŭdis la ribelemojn de la juna generacio kontraŭ la feŭda tradicio kaj ĝian amon de samideeco kaj reciproka subteno. Li simpatiis la virinojn subprematajn de feŭdisimo, precipe la sklavigitajn servistinojn de mal-supera socitavolo. La strukturo de la verko estas tre komplika kaj la vivo kiun ĝi spegulis estas tre vasta kaj riĉa. La figuroj kiujn li kreis tre klaraj en karaktero povas esti vicigitaj en tuta longa galerio, el kiuj ne malmultaj jam fariĝis senmortaj tipoj. Vere granda realisma verko el la ĉinaj klasikaj romanoj ĝi estas. Depost la finverko, ĝi estas ne nur enlande vaste cirkulata per kopioj kaj presaĵoj ligno-



Verkanta en montvilaĝo.

Pentrita de He Joŭĝi, Liu Danzej, Lin Kaj

gravuraj, litografaj kaj stereotipaj, sed ankaŭ koniĝis en aliaj landoj per tradukoj japana, vjetnama, rusa, angla, hungara, germana, franca ktp. Kaj krome, ĝi estis kaj estas senĉese kaj sukcese adoptita al operoj, filmoj, kantrakontoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, gravuraĵoj k. a. artaĵoj kaj rikoltas grandan ŝaton ĉe la popolamasoj.

Sonĝo de Buduaro de Caŭ Hjuekin estas alte takita en la historio de la ĉina literaturo pro ĝia progresema kaj profunda enhavo ideologia kaj originala eminenta atingoj en arto.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

la sama periodo de 1962. Krom siaj filioj en diversaj urboj, la librejo instalas pli ol 7,000 libro-budojn en urbetoj kaj vilaĝoj de diversaj partoj de la lando.

Estas konstatite, ke plejparto de la kamparaj legantoj scipovas legi nur post la Liberiĝo. Ili nun interesiĝas pri diversaj legajoj, ekz-e literaturaĵoj, teoriaj verkoj kaj popularaj libroj pri sociaj kaj naturaj sciencoj.

Por kontentigi tiun bezonon de la kamparo multaj grandaj eldonejoj kompilis kun helpo de verkistoj kaj sciencistoj seriojn da libroj por la kamparaj legantoj.

STUDENTOJ DE LA NACIAJ MALPLIMULTOJ EN GANSU-PROVINCO

En Gansu-provinco troviĝas 12 naciaj malplimultoj. Antaŭ 1949

estis ege malofte por la gejunuloj de tiuj naciaj malplimultoj viziti lernejojn. Sed nun ankaŭ en la altaj lernejoj troviĝas multaj studentoj de la naciaj malplimultoj. La nombro de tiaj studentoj kreskis 32-oble kompare kun tiu de 1949. Krom la ordinaraj universitatoj, kiuj akceptas sendiference studentojn el ĉiuj nacioj, fondiĝis en Langou, ĉefurbo de Gansu-provinco ankaŭ la Nordokcidenta Instituto por Naciaj Malplimultoj.

LA UNUA POMARBARO EN TIBETO

En la Tibet-altebenejo ĝenerale oni ne trovis fruktarbojn de pomoj, piroj, abrikotoj, escepte de kelkaj arboj en la Norbu Lingka (ĝardeno) proksima al la Potalpalaco kaj bienoj de feŭdaj mastroj. Sed nun ĉe la bordo de Lhasa-rivero aperis granda pomar-

baro, kun 16,000 junaj pomarboj transplantitaj de aliaj partoj de Ĉinio. La arbaro okupas 13 hektarojn da kampoj. La pomarboj estis transplantitaj ekde 1955, kaj en 1963 iuj el ili jam portas siajn unuajn fruktojn al la tibetanoj.

PLI KAJ PLI DA FUNKCIULOJ EL NACIAJ MALPLIMULTOJ

Ninghia en la Nordokcidento de Ĉinio estas aŭtonoma regiono de Huj-nacio ekde 1957. Nun en la aŭtonoma regiono, la nombro de huj-aj funkciuloj kreskis trioble ol tiu en 1957, kaj en la lokaj registaroj, kreskis 320%.

Tiuj funkciuloj nun sumiĝas 2,600, kaj okupas postenojn de diversaj niveloj de la regionaj (egalaj al provincaj) ĝis vilaĝaj organizoj. Plejparto el ili estis antaŭe farmuloj, paŝtistoj, servistinoj kaj malriĉaj kamparanoj.

HOŬ ĜIPING:

“Songŝo de Buduaro”



Post la morto de sia patrino Lin Dajju venas al la familio de sia patrinflanka avino.



Baŭju estas punbatata de la patro pro malobservo al feŭdismaj etiketoj.



LA klasika romano “Songŝo de Buduaro” de Ĉaŭ Hjuekin estas fame konata kaj tre populara en Ĉinio. Ankaŭ la multnombraj operoj diversspecaj, kiuj sukcese adaptis tiun romanon, trovas senvelkan intereson ĉe la polamasoj. Kaj la kolora filmo “Songŝo de Buduaro” estas adaptaĵo de sukcesa jueĝju-opero samtitola. Ĉirkaŭ la geherooj Gia Baŭju kaj Lin Dajju kiel la centro, vivoplene kaj zigzage malfaldiĝas la tragedio de ilia amo.

La filmo komenciĝas per alveno de Dajju al la hejmo de la familio Gia. Lin Dajju, post la morto de sia patrino venis sub la zorgon de Gia-familio t. e. la familio de sia patrinflanka avino kaj konatiĝis kun sia pliĝa kuzo Gia Baŭju. Ili plaĉis unu al la alia, kaj amikiĝis tuj ĉe la renkontiĝo. Sed en la sekvanta jaro, neatendite alvenis el aristokrata familio fraŭlino Hjue Baŭĉaj, kiu estis serioza kaj mildanima. Ŝi estis pliĝa kuzino de Baŭju. Ĉar Baŭju havis pecon da jado

kun kiu li naskiĝis kaj Baŭĉaj etan seruron el oro, tial oni diris, ke ili estas destinita paro, ĉar oro kaj jado estas simbolo de bonega geedziĝo. Baŭju vivis intime kun la knabinoj, sed li ŝatis precipe Dajju, kiu estis talenta kaj nobla, kaj iliaj koroj ligiĝis unu kun la alia. La patro de Baŭju, deziregante ke la filo havu brilan karieron de la gloro kaj riĉeco devigis lin lernadi la formalismajn, senvalorajn verkojn, studendajn por la tiama imperia ekzameno. Sed Baŭju, kiu maĉestimis tian karieron, dronis kun Dajju en verkado de lirikaĵoj por interkomuniki siajn sopiron de libero kaj amon sinceran en pli variaj formoj kiuj estis mallaŭdataj de la tiel nomataj ortodoksaj literaturistoj. Baŭĉaj tamen esperis nur, ke Baŭju sin dediĉos al studado por fariĝi altranga kaj riĉa kaj tiel glorigi la prapatrojn kaj famigi sian nomon. Tion Baŭju ekstreme malŝatis kaj abomenis. Ĉar li sopiris sinceran amon kaj liberan vivon, li ofte kulpis pro malobeo al la feŭdisma familia disciplino, ricevis de la patro severan riproĉon kaj kelkfoje eĉ senkompatan vipadon. Ĉiufoje, kiam tio oka-

Dajju enterigas florojn en la ĝardeno por ellasi sian malĝojon.



Dajju meditas post kiam ŝi skribis sian versaĵon sur la mantuko donacita de Baŭju.

zis, li ricevis simpatian kaj konsolon de Dajju. Kaj Baŭju bone komprenis la malfeliĉon kaj ĉagrenojn de Dajju. En la luktoj kontraŭ la katenado kaj subpremado de la feŭda socisistemo, ili dividis inter si siajn dolorojn kaj ĝojojn, kaj formiĝis inter ili amo eterne senŝanĝa. Tamen, la feŭda familiestro, elektis Baŭĉaj kiel edzinon al Baŭju, konsiderante ke Dajju montras sin stranga, kaj estas malpli taŭga ol Baŭĉaj, kiu havis la feŭdismajn virtojn de mildeco kaj obeemo. Por atingi ĉi tiun celon, ili trompe edzinigis Baŭĉaj anstataŭ Dajju al Baŭju profitante la okazon, kiam Baŭju senkonsciigis en grava malsano pro ĉagreno kaŭze de la malhelpo al lia amo.

En la vespero kiam celebriĝis la edziĝa festo de Baŭju, mortis Dajju kun korŝiraj damaĝoj. Kiam Dajju informiĝis pri la geedziĝo de Baŭju kaj Baŭĉaj, ŝi pensis ke Baŭju mem perfidis ŝin, kaj tre afliktiĝis. Ŝi forbruligis la manuskripton de siaj versaĵoj, kaj mortis sangsputinte. Kiam Baŭju trovis, ke la novedzino ne estas kuzino Lin, sed Baŭĉaj, li stultiĝis pro konsterniĝo. Kaj la informo pri la morto de Dajju, lin frene-

zigis, ke li tuj kuris al ŝia restaĵo, eksplodis en ploro, elverŝante el sia koro la malĝojn, indignon kaj bedaŭron. Kaj fine, li senhezite forlasis la kriman familion.

“Songo de Buduaro” estas granda romano en pli ol miliono da vortoj kun multnombraj personoj kaj implikajoj. Estas ja malfacile adapti ĝin al filmo. Sed, lerte elektis la amo-tragedion de Baŭju kaj Dajju kiel centron la reĝistoro de la filmo, kaptis la detalojn de la intrigo, kiuj povas plej bone reliefigi la karakterizajn trajtojn de la geherooj, kaj per kuraĝa kaj arta prilaborado ebligis la filmon sukcese manifesti la kontraŭfeŭdan ideon de la originalo. Samtempe, en aranĝo de la intrigo kaj strukturo, oni alprenis la metodon kombini larĝastrekan bildigon kun subtila priskribo, tiel ke la filma intrigo elvolviĝas pli rapide, montras la tipan medion de la okazaĵoj, senhastan, delikatan kaj sufiĉe detalan priskribadon pri ili. Tio faris la kontraŭdiron de la rakonto pli koncentrita, la karakterojn de la personoj

pli klaraj, kaj tiel plifortigis la artan ĉarmon de la filmo.

Kaj rilate al la “ribelemaj” karakteroj de la geherooj, la filmfarinto donis profundan priskribon. Ekzemple, la naiveco, sen-

(Daŭrigo sur p. 36)

Baŭĉaj edzinigata anstataŭ Dajju al Baŭju.



Dajju malsana informiĝas pri la geedziĝo de Baŭju kaj Baŭĉaj.



Baŭju lamentas pri la morto de Dajju.



Dajju kaj Baŭju kunlegas la libron “Okcidenta Ĉambro” malpermesatan de la feŭda socio.






VEJĈIO


7. Ripeta Minaco kaj Minaca Interludo

RIPETA MINACO — Ankaŭ en vejĉio troviĝas ripeta situacio. Ĝi estas nomata ripeta minaco. Ĉar en tia situacio la du flankoj povas ripete minaci unu la alian. Ĝiajn simplajn formojn oni vidu en la diagramoj 22 — 24.



Diag. 22


Diagramo 22 montras, ke unu blanka ŝtono estas minacata de la nigra flanko. Se nun venas la vico de la nigra flanko, ĝi povas tuj forkapti la ŝtonon per okupo de la punkto A; tiam la situacio fariĝas kia en diagramo 23, en kiu la nove metita nigra ŝtono



Diag. 23


estas minacata siavice. Se la blanka flanko tuj ĝin kaptus, tiam la situacio fariĝus kia en diagramo 24, t. e. sama kiel en diagramo 22. Se oni daŭrigus la ludon tiamaniere ĝi fariĝus eterna ripetado. Tia ripetado ne estas permesata en vejĉio, kaj nek povas esti rigardata kiel egaligo kiel en aliaj ŝakludoj.

Gajno de tia situacio ofte estas tre grava por unu aŭ ambaŭ flankoj. Ekzemple en diagramo 25, se la blanka flanko cedos al la minaco, la interna blanka grupo



Diag. 24

estos tuj forkaptita. Sed se ĝi rekaptos la nigran ŝtonon A, tiam la interna nigra grupo denove estos minacata de forkaptiĝo kiel montrite en diagramo 26. Tial



Diag. 25

(Daŭrigo de p. 35)


brideco de Baŭju kaj lia kuraĝo, ardo, sincero en amo kaj la saĝeco, sagaco, malĝojemo de Dajju, kaj ŝiaj firmeco kaj sinforĝeso en amo — ĉio ĉi vive sin prezentas en la filmo.

Ankaŭ en arta projektado la filmo atingis admirindan sukceson. La koloro de la tuta filmo

estas peza, malvarma kaj griza, perfekte agordiĝas kun la putreco kaj dekadenco de la tipa medio feŭdklasa kaj la tragedia rakonto de la filmo. Ankaŭ la scenoj estas projektitaj akorde kun la karakteroj de la personoj. La domo "Jihongjuan", kie loĝas Baŭju estas hela, vasta kun atmosfero ĝentila kaj vigla; kaj la domo de Dajju, "Hjaŭhjangguan" pura,

kvieta, eleganta, kaj iom soleca, dum la flora salono de la feŭda mastrino — la avino, estas malhela, malnova kaj tro abunde dekoraciita. Ĉio ĉi bone efikas por reliefigi la karakterojn de la personoj, kaj prezenti la atmosferon de la medio. Estas vere, ke ankaŭ ĉi tiu filmo estas unu el la freŝaj floroj de la operartaj filmoj kreitaj en la lastaj jaroj.

por venko de la ludo, neni flanko volas cedi en tia kazo.



Diag. 26

MINACA INTERLUDO — Por solvi la kontraŭdiron, ke tuja ripeto ne estas permesata, kaj ke neni flanko volas cedi al la minaco, en vejĉiludo estas fiksita

la jena regulo de minaca interludo:


Kiam troviĝas situacio de ripeta minaco, la minacata flanko ne povas tuj ripeti la minacon al la kontraŭa flanko. Por ripeti minacon ĝi devas atendi ĝis almenaŭ sia dua vico, do ĝi devas je sia unua vico meti ŝtonon aliloke. Tiu meto estas nomata minaca interludo.

Ĉar la ripeta minaco ofte estas tre grava, tial la minacata flanko devas trovi ne malpli gravan minacan interludon por ke la kontraŭa flanko estu devigata tuj respondi lian interludon, kaj ke li povu ripeti la minacon je sia dua vico. Same faras ankaŭ la alia


flanko. Ili tiel daŭrigas la minacodon ĝis kiam iu flanko ne povas trovi same gravan interludon kaj estas devigata cedi al la minaco.

Por bone koni la tutan proceson, ni vidu la diagramojn 27—30:

En diagramo 27, ĉe la supra dekstra angulo de la vejĉi-tabulo estas ripeta minaco kiu decidas ĉu la blanka grupo povos sin savi aŭ ne. Se la nigra flanko kaptos la ŝtonon N16, ĝi povos endanĝerigi la tutan blankan grupon per kapto de O17. Tial la blanka flanko devas ne cedi al la minaco kaj trovi sufiĉe gravan minacan interludon por sin savi. Ĝi do metas ŝtonon sur G2, kiel en diagramo 28. Timante forkapton de la tri nigraj ŝtonoj Ĝ1, H1,



Diag. 27



Diag. 28

(Daŭrigo de p. 44)

blajn esprimojn en la korespondado kaj interparolo. Krome, kvankam ili komprenas kelkajn fremdajn lingvojn sed ili ankoraŭ ne povas eviti lingvan malhelpon kiam ili devas komerci kun landoj kies lingvojn ili ne komprenas.

La broŝuro donis nerefuteblan ateston ke Esperanto estas la plej

taŭga lingvo por internacia komerco. Ni kredas ke Esperanto estos nepre uzata de ĉiuj komercistoj en la plej proksima estonteco.

ĈOŬLI

Ĉu vi ŝatus ORBITRI? — Jen la nomo de nova ludilo en Esperanto. Ĝi konsistas el 58

kartoj portantaj po unu demandon aŭ respondon zorge elektitajn. El ili pli ol 800 kombinoj povas esti farataj, kaj ili povas ofte inciti larĝan ridon ĉe la ludantoj. Bona amuzilo por grupa vivo de la esperantistoj. Eldonis: Esperanto-Press, Oakville, Ontario, Kanado, Prezo: 5 steloj aŭ US\$ 0.35.

H2, kaj sekve pereon de la tuta nigra grupo, la nigra flanko devas meti ŝtonon F1 kaj forkapti la blankan G1. Tiun meton oni skribas per "3 F1+"*


Nun venas la vico de la blanka flanko. Ĝi refoje kaptas N17. Por minaca interludo la nigra flanko trovis 5 O9 kiu minacas la tri ŝtonojn M8, N8 kaj N9, kaj samtempe povas savi la enfermitajn ŝtonojn. La blanka devas ĝin

respondi per 6 O7+6 kiel montrita en diagramo 29.


Poste la ludo progresas jene: 7 N17+, 8 B19 (minacante detruiri la lokon por du okuloj), 9 C19, 10 N16+, 11 Ĉ10 (intencante elkonduki la du enfermotajn ŝtonojn kaj per tio okupi teritorion ĉe la limo), 12 Ĉ9+2, 13 N17+. Tiam la blanka flanko jam ne povas trovi sur la tabulo alian minacan interludon, ĝi do devas

fari ordinaran meton 14 I18, kaj la nigra ne plu ĝin respondas, sed finas la ripetan minacon per meto 15 O18+, kaj sekve konkeros la tutan blankan grupon ĉe la angulo.

* F1 indikas la punkton, la cifero antaŭ ĝi indikas la vicon de la meto, kaj la signo plus post ĝi signifas forkapton de unu ŝtono de la kontraŭa flanko. Se pluraj ŝtonoj estas forkaptitaj, oni aldonu la ciferon post la signo plus.



Diag. 29



Diag. 30

(Daŭrigo de p. 19)

IMPRESOJ EN HIROŜIMA

jarojn ĉi-tiu domego estas lasita al la atakado de ventoj kaj pluvoj, kaj la registaro ne donis al ĝi plej etan prizorgon. Lastatempe, oni diras, ke multaj kapitalistoj proponis malkonstrui ĝin por konstrui novan domon. Tiuj homoj volas, ke la hiroŝima-anoj, la japanoj, forgesu la krimojn de atombombo, forgesu la krimojn de usonanoj." Li ruĝiĝis de indigno, kaj ankaŭ ni estis ekscititaj de liaj vortoj. Montrante la afiŝon, li diris: "Mi volas esti senpaga klarigisto dum miaj restaj jaroj. Mi rakontos al ĉiuj vizitantoj: kiuj faris ĉi tie la senprecedencan krimegon."

La juna japana amiko diris al mi: "En la somero de 1960, venis ĉi-tien raportisto de la ĵurnalo *New*

York Times. Li volis viziti la plej produnde suferantan atombomban viktimon, por montri, ke ankaŭ ili kunsentas kun la hiroŝima-anoj. Oni do kondukis lin al iu maljuna solulo pli ol sesdekjara apud iu ponto. Kiam la maljunulo eksciis pri la personeco de la vizitanto, li rigardis la fremdulon fikse kaj senvorte. Kiam la usonano ŝajnis sin bonkora kaj afektis zorgemon, la maljunulo subite kriegis: 'For, aĉulo!' Kaj la ĵurnalisto retiriĝis ŝvitante kun teruro."

Ĉio vidita kaj aŭdita en Hiroŝima impresis min tre profunde. La vortoj de japanaj amikoj denove aŭdiĝas en miaj oreloj: "Ekstere Hiroŝima estas kovrita per gazo de falsa paco, sed en la korprofundo de la loĝantaro kuŝas semoj de malamo." Kontraŭ kiu? Tio estas memevidenta.



KVARPIEDA

Unu el la okuloj de Afanti estis iom straba. Iutage la reĝo renkontiĝis kun li kaj lin mokis, dirante: "Afanti, kiel bona estas via straba

okulo! Unu objekto rigardate de vi tuj fariĝas du!"

"Tute prave, Via Reĝa Moŝto," respondis Afanti, "nun mi vidas ke vi estas kvarpieda!"

JUGADO

Sidante antaŭ la guberniestra oficejo, Afanti vidis, ke oni kaptis

ŝteliston. Kiam la ŝtelisto estis eskortita antaŭ la guberniestron, tiu ĉi lin demandis: "Ĉu vi ne hontas ke vi jam okafoje venis ĉi tien?"

Afanti tre miris pri la vortoj de la guberniestro kaj demandis lin: "Vi ĉiutage venas ĉi tien, kial do kulpas tiu, kiu venis ĉi tien nur kelkfoje?"

M. GORKIJ:

Legendo pri Marko

*Ĉe l' bord' de Danub' iam vivis
Feino en densa arbaro.
Kaj foje dum ŝia banado
Ŝin trafis fiŝista retaro.*

*Forkuris pro tim' la fiŝistoj.
Ne fuĝis nur Marko-junulo.
Kaptinte la belan feinon,
Li kisis ŝin daŭre kaj brule.*

*Kaj kvazaŭ vergeto l' feino
Tordiĝis en brakoj potencaj,
Rigardis en liajn okulojn
Ridete kun kaŝa intenco.*

*Dum tago ŝi Markon lascivis,
Sed kiam apenaŭ vesperis,
Enuo obsedis l' junulon:
La gaja fein' malaperis.*

*Jen vagas li tage kaj nokte,
Sur bordo rivera kaj krias
"Ho, kie vi estas, feino?"
Respondas l' ondar' "Ni ne scias! . . ."*

*"Mensogas vi!" — krias l' junulo —
"Vi kaŝas ŝin en via sino!"
Kaj jetis sin li en la fluon,
Por trovi la belan feinon.*

*La bela fein' kiel iam
Nun estas sin ofte bananta
Kaj Marko la teron forlasis,
Sed restis pri li tamen kanto.*

*Sed vi vian vivon travivas
Kiel vermoj en marĉo rampantaj.
Pri vi ne rakontos fabeloj
Pri vi ne sonoros la kantoj.*

El la rusa lingvo trad. B. B.

M. ISAKOVSKIJ:

Iris Li al Okcidento . . .

*Iris li al okcidento,
Al alia flanko — ŝi.
Vokis la komsomolanojn
La civilmilit' al si.*

*Haltis ili. Li demandis
Ŝin ĉe la disiga fin':
"Kion vi al mi deziras
Adiaŭe, karulin'?"*

*Kaj respondis la knabino:
"Mi deziras kun sincer':
Se nur vund', do vund' facila,
Se la mort', do sen sufer'.*

*Sed prefere mi deziras:
Vin evitu la fatal',*

*Ke vi kun rapida venko
Hejmen venu de l' bata!'."*

*Premis li la karan manon.
Diris: "Jen ankoraŭ pet':
Ke vi min pri vi sciigu
Per malgranda leteret' . . ."*

*"Tamen kien ĝin adresu?
Kie do ĝi trovos vin?" —
"Ja ne gravas" — li respondis —
"Via man' nur skribu ĝin. . . ."*

*Iris li al okcidento,
Al alia flanko ŝi.
Vokis la komsomolanojn
La civilmilit' al si.*

Trad. el la rusa lingvo B. B.

Pri la Ĉinaj Humuraĵoj

Ĉinio estas riĉa je popolaj humuraĵoj el diversaj tempoj. Ili povas esti klasigitaj en du kategoriojn: unuj estas cirkulitaj buŝe de la popolamaso kaj aliaj estas kreitaj de verkistoj aŭ redaktitaj surbaze de popolaj legendoj.

Estas multe da lertaj rakontantoj de humuraĵoj en la urboj kaj vilaĝoj de Ĉinio. Ofte okazas ke ili rakontas humuraĵojn ĉe kamporandoj kaj stratoj post laboro al homoj ĉirkaŭstarantaj ilin laŭte ridigante de tempo al tempo kaj tiel ilin refreŝigas kaj plezurigas. Tiaj rakontantoj estas ĉiam bonvenaj inter la popolamasoj.

Frontpaĝe de sia libro de humuraĵoj titolita *Sprita Rido Ŝi Tiangi* de King-dinastio donis la jenajn versojn:

*Alies humuraĵoj servas por
plezuro,
La miaj kun saĝigaj boninten-
tencoj.
Spritaĵoj ili estas laŭ naturo.
Sed servas kiel ja moral-
sentencoj.*

Tio ĉi estas lia opinio pri humuraĵoj. En efektiveco, la humuraĵoj ne devas esti rigardataj nur kiel distraĵoj post trinko aŭ manĝo. Ili bildigis al ni la multkoloran fizionomion de la homa vivo primokante kaj kritikante la malbonojn. Ili variis inter ŝercoj, moko, kaj indignaj riproĉoj kaj insultoj kaj direktas sian akran pinton al malsaĝeco, malspriteco, hipokriteco, friponeco, maldiligenteco kaj aliaj malvirtoj.

La humuraĵojn de la frua periodo en Ĉinio ĝenerale karakterizas

la trajtoj de simpleco kaj saneco de la enhavo. Sed ĉar ili elvolviĝis el la feŭdisma socio dum longa tempo, parto el ili ne povas ne esti influita de la feŭdisma ideologio. Ekde Ming- kaj King-dinastioj (1368-1911 p.K.), paralele kun la prosperiĝo de la urboj kaj estiĝo de la burĝaro, aperis multaj humuraĵoj temantaj pri la vivo reala, tamen ankaŭ ne malmulte

da pecoj vulgaraj, pornografiaj kaj malbongustaj. Post la Liberiĝo, koncernaj organizaĵoj sin okupis pri kolektado kaj kribrado de la humuraĵoj tradicie cirkulitaj en diversaj tempoj. Oni multe laboris super tio ĉi, eltirante el ili esencojn kaj forlasante feĉojn. Jene ni aperigas tri pecojn kaj aliaj ilin sekvos en la aperontaj numeroj de EPĈ.

Pruntepreni

Azenon

En iu vilaĝo troviĝis bienulo, kiu estis analfabeto, sed ŝatis ŝajnigi sin klerulo.

Foje, iu skribis al li leteron por pruntepreni azenon por mueli grenon. Servisto respektive donis la leteron al la bienulo, kiu estis festenanta kun siaj gastoj. Afektante gravan mienon li malfermis, legis la leteron, kaj mansignante li diris: "Nu, post momento iros mi mem."

Saĝa Guberniestro

Vivis iu guberniestro. Aŭdinte ke liaj subuloj nomas lin malsaĝulo, kolera pro honto li ordonis, ke ili arestu la plej malsaĝan malsaĝulon en la gubernio por lin kondamni. La ordono ja estis sen senca, tamen la sendito ne kuraĝis malobei. Havante nenian rimedon li vagis sur la stratoj. Irante el la urba pordego, tuj li ekvidis



Ilustritaj de Jang Jongking

vojiranton dezirantan eniri la pordegon kun bambustango en la manoj. Por eniri kun la stango tenata vertikale, la pordego estis tro malalta. Por eniri kun la stango tenata horizontale, la pordego estis tro mallarĝa. La vojiranto vagis longan tempon antaŭ la pordego, sed neniel povis ĝin trairi. La sendito ekpensis, "Plej malsaĝa li devas esti!" kaj eskortis lin al la guberniestro. Informiĝinte pri la okazaĵo, la guberniestro diris kun ridego montrante la arestiton: "Sencerbulo! Facile vi povus trairi la pordegon kun la bambustango se vi prunteprenus segilon kaj ĝin dupartigus."

Rememoroj pri Ĉina E-movado

La verkinto, nun jam okdekjara estas ĉina veterana esperantisto. Post la Liberiĝo, informite pri la fondiĝo de la Ĉina Esperanto-Ligo, li estis ĝislarne kortuŝita kaj donacis al la loka biblioteko pli ol ducent esperantajn librojn, kiujn li sukcesis konservi tra la militaj jaroj, inkluzive multajn de fruaj jaroj.

— LA RED.

Antaŭ kvindek jaroj, en Ŝanhajo jam fondiĝis la Esperanta Grupo, gvidata de Lu Ŝiking (aŭtoro de la Iernolibroj *Esperanto*, *La Unua Ŝtupo de Esperanto* k.a.), Hiong Zijing, Lju Tongŝeng kaj aliaj. Sed tiam Esperanto ne trovis por si multe da lernantoj.

En la jaro 1913, mi, kune kun aliaj ŝanhajaj samideanoj, iniciatis la Ĥinan Esperanto-Asocion. Por faciligi enlandan kaj internacian korespondadon, leterkesto estis instalita en la tiama Eduka Asocio de Ĝiangsu-provinco, dank' al la helpo de sinjoro Huang Janpej (vicprezidanto de la Landa Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo). Post ne longe oni sukcesis starigi Centran Officejon de Ĥina Esperanto-Asocio, proksime al la Eduka Asocio, sur la strato Linjinlu de Ŝanhajo, kaj pli poste estis establita filiaj officejoj ankaŭ en Kingdaŭ, Ĉangŝa kaj aliaj urboj.

La Asocio starigis Specialan Instituton de Esperanto kaj fondis

Korespondan Lernejon de Esperanto. Sed la Instituto kaj la lernejo sin trovis en financaj malfacilaĵoj, ĉar la kotizoj de la lernantoj apenaŭ povis kovri la elspezon kaj kelkfoje oni devis lombardi por daŭrigi ilian funkciadon. Por disvastigi Esperanton en Ĉinio ni ĉiuj spitis la malfacilaĵojn, penege laboris kaj kunvivis harmonie helpante unu la alian kvazaŭ samfamilianoj. Kaŭze de la tiama maltrankvila situacio enlanda, la lernejo estis devigita ĉesi funkcii. Sed la koresponda kurso kompletigis sian eldonon finfine en 28 partoj. Poste estis eldonitaj ĉe la Komerca Presejo *Krestomatieto de Esperanto* kaj *Plena Gramatiko de Esperanto*. En tio multe helpis al la ĉina esperanta movado samideanoj en la nomita eldonejo solvante teknikajn malfacilaĵojn por presi esperantaĵojn.

En la jaro 1917, estis ĝojiga evento por ĉinaj esperantistoj, ke la Pekina Universitato enkondukis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton en sia kursaro kaj invitis

min kiel ĝian instruiston. Ni ĉiuj estis forte kuraĝigitaj kaj esperis, ke tio multe kontribuos en disvastigo de Esperanto kaj eduko de esperantaj instruistoj. Kun granda ĝojo mi akceptis la inviton. Samtempe, mi funkciis kiel delegito de UEA en Pekino.

Kiam la fama japana esperantisto K. Ossaka vizitis nian landon kaj faris esperantan paroladon en la Pekina Universitato, mi interpretis por li. Pli poste, la rusa blinda poeto Eroŝenko estis invitita instrui Esperanton per angla lingvo en la universitato.

Sed, ĉar la kurso estis nedeviga, nenio malhelpis la lernantojn interrompi sian lernadon, tiel ke en la fino nur treege malmultaj lernantoj finis la lernadon. Pro tio la blinda poeto estis tre malkontenta kaj decidis rezigni la postenon kaj reiris al sia patrujo, malgraŭ ripetita klopodo por reteni lin.

Baldaŭ post la foriro de Eroŝenko, la reakcia registaro ordonis ĉesigon de la esperanta kurso en la universitato, konsiderante Esperanton kiel ion havantan rilatojn kun komunistoj.

Ĉinaj esperantistoj estis multe persekutataj ankaŭ sub la regado de la Ĉiang Kajŝek-kliko.

Pasis jam kvindek jaroj. Hodiaŭ, kiam "kune floras cent floroj", ankaŭ la esperanta movado revigliĝas kvazaŭ velkinta arbo reviviginta en printempo. Mi tre ĝojas ke mi vidas propraokule la prosperiĝon de la esperanta movado en Ĉinio.

Ŝanĝo de Ŝuoj

Al provinca ekzameno iris du instruituloj, kiuj estis fratoj. Erare surmetinte en hasto du malsamajn ŝuojn, unu kun dika plandumo kaj la alian kun maldika, la pliaĝa frato lametadis survoje. Li diris al si mem: "Kial hodiaŭ miaj du kruroj ne estas egallongaj? Eble pro tio ke la vojo estas malebena."

Vojiranto al li diris: "Vi erare surmetis neparajn ŝuojn!" Eksciinte la kialon, li petis la plijunan fraton iri hejmen por preni la ĝustan. La plijuna frato foriris longan tempon kaj kun manoj malplenaj revenis dirante al la frato: "Vi ne bezonas ŝanĝi, ĉar la ambaŭ ŝuoj en la hejmo estas neparaj, unu kun dika, kaj la alia kun maldika plandumo."





E-KURSO POR INSTRUISTOJ

Por bone enkonduki Esperanton en altaj lernejoj en diversaj lokoj de Ĉinio, Speciala E-kurso por instruistoj estas organizita en Pekino. Ĝi komenciĝis je la 6-a de lasta decembro. Ĝin partoprenas 11 instruistoj de fremdlingvaj fakultatoj de dekunu universitatoj kaj kolegioj en Pekino, Ŝanhajo, Vuhan, Ĉengdu kaj aliaj lokoj.

ZAMENHOF-FESTO CELEBRITA EN PEKINO

Pekinaj esperantistoj kunvenis la 22-an de dec. 1963 por memori la ĵuspasintan naskiĝtagon de D-ro L. L. Zamenhof kaj festi la tuj venontan novjartagon de 1964.

K-do Ilin parolis en la kunveno pri la rolo de Esperanto en la interpopola kompreniĝado kaj pri la promesa perspektivo de la esperantaj laboroj en Ĉinio kaj en diversaj landoj ĝenerale.

Sekvis informoj pri enkonduko de Esperanto en lernejojn en Ĉinio kaj aliaj landoj. La informo interesis precipe la anojn de la Kurso por E-instruistoj, kiuj la kunvenon ĉeestis.

Profesoroj Ĉen Kihiang kaj Ju Daŭĉuan parolis pri siaj personaj spertoj pri la utilo de Esperanto.

Parolis ankaŭ multaj aliaj. Inter la paroloj prezentiĝis kantoj kaj humuraĵoj. Ĉiuj en la kunveno portis en la koro la ĝojan senton.

NOVAJ E-LIBROJ EL ĈINIO

La eldonado de la Ĉina Esperanto-Ligo ĉiam pli vigliĝas. Multaj

manuskriptoj estas preparataj en diversaj stadioj. Nur el la presataj oni trovas ĉe redaktado de tiu ĉi informo la artan albumon *El Ĉina Fotografia Arto*, la bildorakontojn *La Bela Ĝuang-brokato*, *Bela Konvolvulo*, *Sun Vukong Trifoje Batis la Spiriton de Blanka Skeleto*, kaj la libron *Konciza Geografio de Ĉinio* ofte postulatan de la legantoj. Estas senditaj al la presejo ankaŭ la manuskriptoj *La Akupunkturo kaj Kaŭterizo de Ĉinio*, populara libro pri tiuj ĉinaj tradiciaj terapioj, kaj *Aŝma*, longa poemorakonto, literatura perlo de sani-nacio.

ESPERANTO UZATA EN ĈINA EKSPORTO

En septembro lastjare eldoniĝis en Ĉinio ampleksa katalogo de komercaĵoj por eksporto, funkciigata de la Ĉina Ŝtata Korporacio de Importado kaj Eksportado de Maŝinoj. En la katalogo estas klarigitaj 533 komercaĵoj dividitaj en 18 kategorioj. Multaj maŝinoj en la katalogo estas ilustritaj per klaraj fotoj. La ĉefa parto estas redaktita en la ĉina kaj angla lingvoj. Sed la antaŭparolo kaj indekso estas presitaj en la lingvoj rusa, franca, hispana kaj Esperanto. Interesiĝantoj povas ĝin peti de la korporacio laŭ la jena adreso: "Erh Li Kou, Hsi Chiao, Peking, Ĉinio".

JAPANA ESPERANTISTO EN PEKINO

Japana esperantisto A. Takagi vizitis Pekinon en la pasinta novembro. Li estas leganto de

"El Popola Ĉinio" ekde ĝia unua periodo (1950-1953), do malnova amiko de ĈEL kaj la ĉina popolo. Okazis gaja renkontiĝo esperantista kaj interŝanĝo de salutoj kaj donacoj.

HONORO AL K-DO A. GRIGOROV

K-do Asen Grigorov, Esperanta pioniro en Bulgario, redaktoro de *Nuntempa Bulgario* ricevis lastjare de la prezidantaro de la Parlamento altan ordenon de "9-a de Septembro 1944", la unuagradan pro sia merito en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj en la konstruado de socialismo, en la kultura kaj la socia vivo de la lando. Pro tio la CK de BEA kaj Sofia E-societo "M. Gorkij" aranĝis por li celebran kunvenon en Sofio. Ĉiuj gratulis lin.

Laŭ bulgara esperantisto

ESPERANTO EN POLA INFANDOMO

Rondo de Junaj Esperantistoj ĉe la Ŝtata Infandomo en Gdańsk-9 naskiĝis iniciate de edukisto Henryk Kozaczuk la 21-an de januaro 1963 j. En la dua duono de februaro de la pasinta jaro fondiĝis la elementa kurso de Esperanto, al kiu apartenis 17 gejunuloj.

Jam fine de marto gejunuloj komencis ligi la eksterlandajn kontaktojn. Oni decidis aranĝi en majo grandan ekspozicion de ilustritaj poŝtkartoj, poŝtmarkoj, turismaj faldprospektoj kaj afiŝoj; landkartoj kaj revuoj. La solenan malfermon de la ekspozicio faris vicprezidanto de la Prezidantaro de Urba Konsilantaro s-ro F. Mackiewicz.

Ĝin partoprenis ankaŭ aliaj eminentuloj. El la Televidprogramo de Televido Gdańsk oni povis rigardi interesan raporton pri la ekspozicio, kiun vizitis pli ol 700 personoj. Sur tagjurnaloj aperis du seriozaj artikoloj pri la ekspozicio.

ESPERANTO NIA LIBROBRETO

MARJORIE BOULTON:
ZAMENHOF Aŭtoro de Esperanto
— kovrilo de David Hastie Young,
eldonis STAFETO, formato: 22 ×
15.5 cm., 294 (268 plus 26 bildo-
paĝoj, prezo: broŝ., 3.00; tolbind.,
3.80 US\$ aŭ egalvaloro.

Por esperantistoj Zamenhof ne estas persono fremda, tamen oni ankaŭ devas konfesi, ke ne ĉiuj esp-istoj lin bone konas kaj studas.

Iuj esperantistoj adoras la lingvon same kiel la kreinton; aliaj distingas la lingvon de la ideoj de la kreinto; multaj neesperantistoj kaj kontraŭantoj de Esperanto

negative kritikis kaj Esperanton kaj Zamenhof.

Kiu tamen estas prava? Antaŭ la juĝo oni devas fari profundan studon de koncerna materialo. Bedaŭrinde tio ĉi ne estas akcentita de la esperantistoj. Literaturo aperinta tiuflanke estas tre malmulta. Kaj ampleksaj libroj tiufankaj mankas.

La malmulta ekzistinta materialo tiufanka povas esti klasifikita en du kategorioj: La unuan reprezentas "Vivo de Zamenhof" verkita de E. Privat, kaj la duan, "Zamenhof" verkita de E. Drezen. La unua estas pli malpli konata, kvankam ne sufiĉe, inter la es-

perantistoj, kaj la duan legis nur tre limigitaj esperantistoj.

La verko de Privat estas majstrajo laŭ lingvo. Ĝi kortuŝas la legantojn per vervo kaj poezio, sed ne per historia scienco. Ĝi vidis Zamenhofon en la vidpunkto de la idealismo de Zamenhof kaj trovis nenian mankon en li. Tiu de E. Drezen faris bonan fundamenton por koni science Esperanton kaj ĝian kreinton. Ĝi taksis la lingvon laŭ objektiva bezono de la lingva evoluo, kaj Zamenhofon sub la lumo de historia evoluo, donante taŭgan takson ne nur laŭ la fina celo de la idealo, sed ankaŭ laŭ la socia signifo de la metodo por atingi la celon.

Bedaŭrinde la ambaŭ verkoj estas tro koncizaj. Ili ne sufiĉas por tiuj, kiuj volas plene kompreni Zamenhofon kaj fari al li ĝustan takson. Ĉar ili ne estas sufiĉe dokumentitaj per kon-

La Rondo kontaktiĝas kun ĉiuj turismaj organizadoj en la mondo, kun kiuj ĝi interŝanĝas turismajn faldprospektojn kaj afiŝojn.

Je la 25-a de julio 1963 j. membroj de la Rondo partoprenis somertendaron de 17 Ŝtataj Infandomoj en ĉarma regiono situanta apud la urbo Elblag en Kadyny. Dum la pasigo de la tendara tempo la Rondo faris esperantan filmon, kiu nuntempe estas en preparado.

La plano en 1963-64 de la Rondo estos vasta. El ĝi la speciale atentinda estos la granda ekspozicio titolita "Infanoj de la Mondo", kiun la Rondo intencas malfermi en majo 1964.

Laŭ informo de H. Kozaczuk kaj Cz. Bazylczyk prez. kaj sekr. respektive de la Rondo.

LA 49-A UNIVERSALA KONGRESO

La 49-a UK Okazos ĉi-jare de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto en



la nederlanda urbo Den Haag. Ĝin protektas la reĝino de la lando. Specialaj glumarkoj por la Kongreso estas eldonitaj. Oni povas ĝin mendi ĉe la libro-servo de UEA, en Rotterdam.

13-A NACIA KONGRESO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (I. F. E. A.)

En la kadro de la 34-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto, la 15-an de septembro je la 19-a horo en salono de la Kongresa Centro en Granda Hotelo Billia de S. Vincent, okazis nia Jarkunveno.

Post la malferma ceremonio la Sekretario Gimelli raportis pri la

agado de la Asocio kaj pri la 15-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Stoke-on-Trent (Britujo), kie oni decidis la stariĝon de Konstanta Komitato de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (I. F. E. F.), kie devas esti reprezentata ĉiu landa asocio. Pro tio oni devis baloti por elektitajn landan reprezentanton. La ĉeestantoj elektis kiel italan reprezentanton S-ron Gimelli Germano de Bologna. Oni anoncis ke la venonta Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso (16-a I.F.E.F.-Kongreso) okazos en Bruselo (Belgujo) de la 9-a ĝis la 15-a de majo 1964-a kun tre alloga programo.

La Prezidanto, fine, resumis la laboron faritan kaj planis tiun farotan por la plibonigo de nia Asocio, por plivastigo de nia Esperanto-Movado inter la fervojistoj, kaj disvastigo kaj kono de Esperanto en fervojista medio.

Laŭ informo de Gimelli Germano, Italio

cernaj grandaj historiaj faktoj, kiuj devis difini la agadon de la personoj de tiu tempo kaj devas esti kriterio por juĝi iun homon en tiu tempo.

La apero de la nuna verko de Boulton estas unua bona paŝo por ŝtopi tiun mankon trovitan en la verko de Privat.

La libro estas dividita en 23 ĉapitrojn kiel ĝia antaŭa angla eldono, sed pliriĉiĝis per interesaj detaloj. La unuaj sep ĉapitroj rakontis pri la familio de Zamenhof, la kreo de Esperanto kaj ĝia publikigo. La oka ĝis la deka priskribis la komencajn tagojn de Esperanto, ĝis la triumfo de la Bulonja Kongreso. La dekunua ĝis la dekoka registris la evoluon de E-movado kaj la Ido-skismo. De la deknaŭa ĝis la fino estis resumitaj la laboroj de Zamenhof, lia familia vivo en la maljuna aĝo, lia morto kaj la E-movado ĝenerala post lia morto.

Same verva estas la verko de Boulton kiel tiu de Privat. Sed ĝi karakteriziĝas per tio, ke dank' al amaso da poste aperintaj materialoj pri Zamenhof kaj pri la movado la aŭtorino povis pli detale kaj pli libere rakonti la faktojn kiujn publikigi ne eblis aŭ ne oportunis kiam Privat verkis sian libron. Aliflanke la aŭtorino klopodis laŭeble doni historiajn fonojn en sia verko, precipe priskribon pri la medio de Zamenhof. Tio estas granda progreso kompare kun la verko de Privat. Ĝi same estas verko kiu vidas Zamenhofon en lia idealismo. Tamen la verkinto kolektis riĉajn materialojn kaj ilin bonege ordigis en bonstila Esperanto, kaj en kelkaj rilatoj prilumas la vojon por plua scienca studo.

Vera scienca kaj same ampleksa studo pri Zamenhof laŭ vidpunkto konforma al socia evoluo devas esti farata por la triumfo de Esperanto kiel same por la venko de la fincelo de la idealismo de

ĈU VI AĈETIS JENAJN ELDONAĴOJN EL LA NASKIĜLANDO DE LA KREINTO DE ESPERANTO?

La Faraono de Prus (3 volumoj)	zł. 105	Us\$5.00
Quo Vadis de Sienkiewicz	43	2.50
Internacia Fundamenta Elektra Vortaro		
Pola-esperanta, Esp-pola	13	0.55
Medalioj de Nałkowska	14.50	0.60
Principoj de la Racia Muzikskribo de Wójcik (multobligita, fama projekto pri simpligo de notskribado)	8	0.35
Supera Kurso de Esperanto de Dreher (nur esp.)	6	0.25
Koloroj de Baghy	23	0.95
El la Vojaĝo tra Eŭropo (ilustrita albumo)	15	0.60
Nigra Kokino (libreto por infanoj)	3.50	0.15

Krome ankoraŭ aĉeteblaj estas la jenaj belaj jubileaj medaloj kun skatoloj: arĝenta zł. 65, Us\$2.70; bronza zł. 55, Us\$2.30

ĈIUJN ĈI ELDONAĴOJN KAJ ESPERANTAĴOJN ONI
POVAS MENDI ĈE ARS POLONA, KRAKOWSKIE.
PRZEDMIĘSCIE 7, WARSZAWA, POLLANDO.

Zamenhof. La verko de Boulton ja helpas al tiu laboro.

HONFAN

STUDOJ PRI AMELOJ DE LEGUMENOJ — La 14-a traktato de la Agrikultura Fakultato de la Kagawa Universitato, verkita de Prof. Sinitirô KAWAMURA, profesoro de agrikultura biokemio de la universitato. Formato: 18 × 25.5 cm., 49 paĝoj. Por interŝanĝo oni adresu al Faculty of Agriculture, Kagawa University, Mikityô, Kagawa-ken, Japanio.

Gratulindaj estas la sciencistaj esperantistoj, ke ili ofte praktikas Esperanton en siaj sciencaj laboroj, kaj per tio iom pli vaste konigas siajn studojn al la mondo kaj alportas al Esperanto novan kontribuon por ĝia plua evoluo. Nun venis al ni denove nova tia faka verko.

Kiel montrite en la titolo, tiu ĉi traktato raportas studojn pri la nomita fako. La tuta verko dividiĝis en kvar ĉapitrojn kun enkonduko, konkludo kaj aldono. Por la studo la verkinto referencis 118 koncernajn verkojn kaj faris multajn eksperimentojn pri

11 specoj da legumenoj. En la traktato troviĝas ankaŭ riĉaj fabeloj kaj diagramoj. Ili certe estas tre valoraj al koncernaj fakuloj, kvankam al mi laiko pri tiu ĉi scienco ŝajnas seninteresaj.

H. F.

ESPERANTO EN KOMERCO

— eldonita de Esperanta Rondo Crailsheim, Germanio, 1962 — enhavas raportojn de 86 firmaoj el 22 landoj, kiuj montris ke Esperanto jam nun estas praktike kaj sukcese uzata en komerco kaj trafiko, kaj ĉiuj firmaoj akcentis ke Esperanto estas klara, facile lernebla kaj facile uzebla. Eraroj kaj miskomprenoj ne okazis.

La internacia kontakto konsistas el multaj formoj, el kiuj la korespondado de komerco plejofte okazas inter diversaj landoj. Nuntempe oni uzas multe da malsamaj lingvoj, tial ĉiuj komercistoj devas lerni almenaŭ du fremdajn lingvojn. Tamen, neniu povas paroli kaj skribi fremdajn lingvojn tiel libere kaj lerte kiel sian nacian lingvon. Oni ne malfacile trovas erarojn kaj nekomprene-

(Daŭrigo sur p. 37)

SKRIBAS NIAJ LEGANTOJ

KELKAJ PROPONOJ

En EPĈ, krom “seriozaj” artikoloj, necesas enkonduki “distrofakon” kun konkursoj, enigmoj, eĉ amuz-paĝo. Ni utiligas EPĈ por E-kursoj (la legado), do komencantaj esp-istoj bezonas ion facilan, iom distran.

En ĉiu numero necesas lokigi 4-6 paĝojn kun koloraj fotoj. Krom tio iuj artikoloj (laŭ sia enhavo) nepre bezonas kolorfotojn, ekz., “Somero en Kantono” (N-ro. 5, 1963, p.213) kaj “Blankjadfloro” (N-ro. 5, 1963, p.244). Malalta abonprezo estas bona afero (kiel nuna), sed ne penu tro malaltigi la abonprezon, pli bone estas “pliluksigi” la revuon.

Numerigon de la paĝoj, laŭ nia opinio, necesas fari normala — de n-ro. 1 ĝis n-ro. 50. Tiel, estas pli bone, pli oportune.

P. Vasilĉenko, Sovetunio

PUBLIKIGO DE GEOGRAFIAJ ARTIKOLOJ

Via revuo atestas, ke kvankam Ĉinio estas tre malproksima, sur la alia flanko de la terglobo, ĝiaj vivo, laboro, sopiroj kaj deziroj estas la samaj kiel la niaj Ankaŭ la esperanta lingvaĵo estas bonega, ja modela pro siaj gramatika simpleco kaj esprima riĉeco. Mi admiras la lertajn kaj spertajn tradukojn; speciale mi volas danki pro la bonegaj tradukoj de poemoj, poemetoj kaj kantoj, kiuj abundas en la revuo kaj arte plivalorigas ĝin.

Mi ŝatas, se vi povos en proksimaj numeroj publikigi mallongajn artikolojn pri ĉina popola respubliko, pri situo de provincoj, urboj, riveroj, ktp. La ĉefa transskribo de ĉinaj nomoj iom diferenciĝas de tiuj de vi uzataj en la revuo kaj ne estas ĉiam facile por mi trovi ilin sur la

geografia karto. Krome, mi opinias, ke tiu ago estus valora kontribuo kaj samtempe sekvinda modelo por unuigo de esperanta ortografio de propraj nomoj.

J. Patera, Ĉeĥoslovakio

PRI TEKNIKAJ RAPORTOJ

Kvankam al mi, kiel al ĉiu pacama homo, estas interese kaj ĝojige legi kiel la ĉinoj konstruas por si novan kaj esperplenan landon, mi kredas, ne estante sciencisto, ke la teknikaj detaloj de tiuj modernigo kaj pluevoligo devus esti lasataj al fakaj ĵurnaloj. La tekniko estas tereno, en kiu iu nacio ne havas apartaĵojn, kaj revuo celanta respeguli la vivon de popolo, kiel la via, faras plej bone, se ĝi koncentrigas sian atenton al la kulturo kaj artoj, kaj tradiciaj kaj modernaj, de tiu popolo. . . .

Tamen, ne kredu el tio, ke mi malestimas al teknikaj raportoj en via estimata revuo; mi nur volas plendi kontraŭ la sinteno, ke la teknika progreso estas la nura afero pri Ĉinio kio estas al ne-ĉinoj interesa, kaj ke la kul-

turo k.s. malgravas. Laŭ mi, la kultura kaj teknika flankoj okupu egalajn lokojn en la bildo de popolo, ĉar neniu el ili povas plej bone disflori sen la alia. Volonte mi vidos en EPĈ pli da teknikaj artikoloj, sed tio okazu nur per pligrandigo de ĉiu numero, ne per malplimultigo de la ceterspecaj enhaveroj.

Brian R. Moon, Britio

Rimarkoj de la Redakcio

De niaj legantoj ni ofte ricevas leterojn kun entuziasmaj laŭdoj kaj kuraĝigoj kaj kun valoraj opinioj kaj proponoj. Bedaŭrinde, la tempo ne permesas al ni respondi al ĉiuj kaj ni povas publikigi de tempo al tempo nur parton de tiuj leteroj kun ioma malplilongigo. Tamen, ni estas ĉiam dankaj al ĉiuj skribintoj, kaj ni ĉiam varme atendas la kunlaboron de ĉiuj legantoj, kiu estas nepre necesa por la plibonigo de la enhavo kaj formo de EPĈ.

Ĉiujn opiniojn kaj sugestojn ni bone konsideros kaj efektiviĝos laŭ ebleco. Koncerne la bezonon de ĉina mapo ni pretas eldoni baldaŭ apartan libron pri geografio de Ĉinio ne nur kun mapo sed ankaŭ kun interesaj informoj kaj fotoj. Ni kredas, ke tio multe helpos al niaj legantoj pliriĉigi sian scion pri nia lando.

SANON AL VI, KARAJ ABONANTOJ!

Tiucele ni preparas specialan donacon en formo de libreto pri la arto de ĉina tradicia korp-ekzerco, konata kiel


TAJĜIĈUAN

Ĝi povas ne nur fortigi la korpon kaj preventi malsanon sed ankaŭ havas rimarkindan kuracan efikon al pluraj kronikaj malsanoj. La libreto bone klarigas la arton kun pli ol 170 ilustraĵoj. Ĝi taŭgas por viroj kaj virinoj, junuloj kaj aĝuloj.

Ĉiuj niaj abonantoj ĝin ricevos kune kun la dua numero de nia gazeto.

Por frue havigi al vi tiun mirindan sanigilon, abonu tuj la gazeton!

REDAKCIO DE EPĈ



Korespondi Deziras

* La jenaj bulgaraj geesp-istoj dez. kor. kaj interŝ. bk.:

S-ino Dimitrana Tabakova, dentistino, Ruse, str. Solun, 2, Bulgario.

F-ino Kerima Ibrahimova Hasanova (turkino), kontistino, Ruse, str. Balkan, 9, Bulgario.

* Chinoin medikament-fabriko Esperanto-grupo, Budapest IV. Ujpest, To u. 1-5, Hungario, kun ĉl.

* La jenaj hungaraj geesperantistoj dez. kor. kun ĉl.

Eva Pehovits, Budapest, IV. To u. 8/a.

Ilona Gyarmati, Maglód, Hock J. u. 14.

Marja Ferenczy, Budapest IV. Leningen u. 27.

Sari Doktor, Budapest IV. Baross u. lkt. "K".

Vera Csomos, Budapest XV. Eotvos u. 102.

Olga Bajan, Budapest IV. Petofi u. 32.

Zsuzsa Hidas, Budapest XIII, Mautner S. U. 57. b.

Edit Nagy, Budapest IV. Pozsonyi u. 9.

Gyongyi Cserei, Budapest IV. Garai u. 7.

Katalin Nagy, Budapest XV. Szerencs u. 86.

Tibor Prostyak, Alsogod, Gorkij u. 17.

Emo Jenei, Budapest XV. Dessewffy u. 117.

Vera Nyitrai, Budapest XV. Vag u. 104.

* Ganco M. Radkinov, bulv. "Aprilov" 37, Gabrovo, Bulgario, kaj Marin Pencev, bulv "Aprilov" 35, Gabrovo, Bulgario, dez. kor. kun aziaj k aliaj landoj pri tek-

niko, E., moroj, pacmovado, kc. * Ivan Daskalov, pentristo, Mezdra, Bulgario, kun ĉl. pri ĉt. k interŝ. pk., esp. librojn, fotoalbumetojn,- vidajojn, bildreproduktajn, k.a.

* Radio-Inĝeniero Juska Stasvs, Vienvbes a. 12-1, Panevezys, Litovio, USSR, dez. kor. pri ĉt. interŝ. esp. librojn k gazetojn.

* Sandor Domosi, Varpalota, poŝt-fako 48, Hungario, precipe kun orientaziaj esp-istoj, pri folkloro, grafiko, pentrarto, k.c.

* Zbisniew Byrka, ul. Promenada 13, Recz-Pomorski, Choszczno, Szczecin, Pollando, kun ĉl. k interŝ. gazetojn, pk., gramofon-diskojn, k.c.

* * *

Ni planas organizi ekspozicion de Esp. gazetoj por pruvi antaŭ la publiko la disvastigon, gravecon, aplikeblon k utilon de Esp., tial ni petas la redakciojn de Esp. revuoj k gazetoj montri solidarecon, sendante al ni provekzempleron. Estos tre utile sendi ankaŭ revuojn k gazetojn kiuj uzas Esp. por recenzoj, por fakartikoloj k por enhavolisto.

Ĉiu sendonto ricevos dankleteron, il. pk. k, se eble, ankaŭ alian rekompencan.

Ni ankaŭ dez. starigi kontaktojn kun esp-istaj societoj diverslandaj. NUR en societa aŭ grupa skalo.

Skribu al: **Esp-ista societo "Vekiĝo", P. K. 60, Kolarovgrado, Bulgario.**

* * *

Rosaria Esp. Lernejo dediĉita al la disvastigo de Esp. en Argentino, ĉefe per Koresponda Kurso, bezonas novajn aŭ uzitajn librojn, gazetojn, broŝurojn, pk, afiŝojn, k kian ajn Esp. materialon por siaj Cirkulanta Biblioteko k Cirkulanta Ekspozicio. Anoncetojn de tiuj kiuj volas kor. kun argentinaj ĝi publikigos senpage en: Lerneja Esp. Revuo.

Adr.: **Casilla de Correo 278, Rosario, Argentino.**

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonita de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (84) 1964

Ĉefa Enhavo

*Bildo sur la kovrilo — Reĝoĵiĝo
Foto de Ĝang Hjuŝeng*

Por Nova Venko en la Nova Jaro!
La Ĉina Industrio de Agrikulturaj Maŝinoj

Elektro en Kamparo

La Sportkunveno de la Nove
Emerĝantaj Fortoj

La Mara Transportado de Ĉinio

30 Jaroj sur Tongtian-rivero

En Vilaĝo de la "Nomada Popolo"
Impresoj en Hiroŝima

Ki Bajŝi

Nia Nova Buroestro (*Novelo*)

Ĉaŭ Hjuekin — Granda Verkisto
de Ĉinio

"Songo de Buduaro"

Veĵcio

Pri la Ĉinaj Humuraĵoj

Rememoroj pri Ĉina E-movado

*Bildo sur la dorskovrilo — La
monturbo Ĉongkino*

Foto de Ho Ŝijaŭ

~~~~~

★ Ĉiuj materialojn por nia **redakcio** aŭ por interŝanĝo sendu al P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

★ Ĉiuj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nia gazeto sin turnu al **Libro-Servo de ĈEL**: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

★ Tradukoj, represoj kaj ĉiuj aliaj bonvolaj utiligoj de la materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj, ni petas nur tion, ke oni menciu devenon de la materialoj kaj **sendu al ni du ekz. de la presaĵo** sur kiu aperis la koncerna materialo.





Cervoj (el la baldaŭ aperonta albumo "El Ĉina Fotografia Arto")

Foto de Liu Entaj



